

Turka Stelo



SALUTON,

Jen nia unua numero en la nova jaro 2021! Ni deziras al ĉiuj feliĉon, prosperon kaj ĉefo SANON !

Ni denove proponas al vi legi interesajn tekstojn. Jen kelkaj el ili:

- En la angulo Tempo Sigelita Konuralp Sunal parolas pri kino, la monda scienco.
- En la greka mitologio angulo Spiros Sarafian rakontas pri ENEO.
- En la angulo Bildoj el la historio de la esperanta literaturo vi povas legi pri la hungara verkisto István Nemere.
- La novelo de Erik Tantal "La Kimero" daŭras kun la 8-a ĉapitro.
- En la Literaturaj Paĝoj de MAS angulo ni prezentas novan rakonton de Franco Kafka.
- Roland Platteau daŭrigas la serion Astrologio Kontraŭ Psikologio kaj ankaŭ sendis tradukaĵon de portugala fadoa kanto.
- Antanas Vaitkevičius tradukis pr vi la rakonton "Verda arbaro, vitra palaco".
- Bardhyl Selimi daŭrigas sian serion Amuza Matematiko.

- Helga Plöetner rakontas pri sia pentraĵo "Klaus-Dieter Loetzke".
- Siv Burell en la sveda esperanta gazeto "Ora ĵurnalo" gratulas nian revuon pro ĝia kvinjariĝo.
- Nia kara kontribuanto Carmel Mallia el Malto sendis ĉapitron el sia ankoraŭ verkata biografio romano.
- Laimundas Abromas sendis humuran rakonton "Konsiloj al komencanta esperantisto".
- Danke al Dimitrinka Kateva ni daŭrigas la publikigon de konkursaĵoj de EKRA 2020.
- Adri Pásztor sendis poemtradukaĵon el la hungara literaturo "Kapreol-Avinjo".
- Vi povas legi la duan parton de la humura rakonto de Gersi Alfredo Bays "Kredu min samideanoj".
- Ni publikigas la trian parton de la "Mirinda renkonto" de Miriĉ Jadranka.
- Ni daŭrigas la publikigon de poemego "Ho, homaro" de Gafur Mirzabaev.

...kaj multaj aliaj.

Bonan legadon al ĉiuj!

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Defio	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Ciklo kun Hori Jasuo	4
Tempo Sigelita	5
ENEO (AINEIAS)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
El la libro de "Dao de Jing"	10
La kravato	10
Koko kaj Perlo	11
Ŝercoj	11
La Kimero - Rakonto el la estonteco (8)	12
El la literaturaj paĝoj de MAS	13
«Patrin' mia 'stis cigaredist'»	14
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	15
Verda arbaro, vitra palaco	15
Amuza Matematiko	18
Astrologio - Januaro/Kaaprokornoj	19
Klaus-Dieter Loetzke (1941-2006)	20
Ora Ĵurnalo el Svedio gratulas Turka Stelon	21
Ĝelsomina	22
Konsiloj al komencanta esperantisto	23
SENPLUMULETO (EKRA2020)	24
Kapreol-Avinjo	26
Kredu min samideanoj! (2)	27
Mirinda renkonto (3/10)	28
Irenda sorto de la virino	29
Krucvortenigmo	30
HO, HOMARO! (aŭ invito al medito)	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ekde la 22-a de novembro ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj:

- 22/11 Akuzativo
- 29/11 Transitiveco
- 06/12 Parteciploj
- 13/12 Korelativoj
- 20/12 Prepozicioj
- 27/12 Sufiksoj
- 03/01 Refleksiva pronomo: Si

<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Defio

En la templo de l' konscienco,
Dio alparolas nin silente.
Dian heredon, ni ricevas
la libervolan trezoron
por aŭdi Lian Voĉon
aŭ nutri la tenton,
kiu ankoraŭ loĝas en ni.

Maria Nazaré Laroca
Juiz de Fora, 25/10/2020
Brazilo



fonto: <http://esperanto.brazilo.org/archives/20672>

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 66a Internacia Esperanto-Sumoo De la 8-a ĝis la 22-a de novembro 2020.

Analizo:

- 1. Partoprenantoj:** 356 el 34 landoj
- 2. La tuta nombro de partoprenantoj** ekde septembro 2009 ĝis nun 13 264 homoj
- 3. Laŭlandaj nombroj:**
 - 1. Japanio: 65
 - 2. Ĉinio: 43
 - 3. Brazilo, Francio: 40
 - 5. Koreio: 35
 - 6. Pollando, Germanio: 16
 - 8. Italio: 14
 - 9. Rusio: 13
 - 10. Britujo: 12
 - ...
- 3. Perfektaj venkintoj** (15 venkoj): 327 el 356 (91,6%)
- 4. Kvanto de legitaj paĝoj:** 20 089 paĝoj

Nia retejo:


<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/75906697088217/?fref=ts>



UEA



N-ro 921 (2020-12-18)
UEA kongresos en Torino, Nord-okcidenta Italio, en 2023

Por la 108-a Universala Kongreso (UK), post tri jaroj, la Estraro de UEA unuanime elektis Italion kiel kongreslandon. La kvaran fojon UK okazos en Italio. [...]

N-ro 920 (2020-12-16)

106-a UK, Belfasto: kongresa temo, emblemo kaj unua aliĝperiodo

La 106-a Universala Kongreso (UK), kiu okazos en Belfasto, Nord-Irlando, de la 17-a ĝis la 24-a de julio 2021, havos kiel temon "Paco kaj konfido: universalaj valoroj". [...]

N-ro 919 (2020-12-14)

Mesaĝo de UEA okaze de la Zamenhof-tago, 15-a de decembro 2020: Esperanto por monda kunlaboro

La 15-an de decembro la parolantoj de la internacia lingvo Esperanto festas la Zamenhof-tagon, nome la tagon de Ludoviko Lazaro Zamenhof, deklarita de Unesko 'merita monda personeco' pro la kreado de la internacia lingvo Esperanto kaj pro la disvastigo de la ideoj de paco, interkompreniĝo kaj kunlaboro inter ĉiuj popoloj. [...]

N-ro 918 (2020-12-07)

Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Homaj Rajtoj, 10 decembro 2020

Mesaĝo sendita al UN. Kun afabla peto republikiĝi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon! [...]

TEJO



Retaj kunsidoj, Talento kaj Egaleco – Enmovade #3

En la nova epizodo de Enmovade, ni estas malantaŭ la kulisoj de la dua reta komitatkunsido de TEJO! Niaj volontuloj Valentin, Quentin kaj Renato helpis teknike dum la sesioj kaj ĉi tie rakontas pri sia sperto. [...]

Intervjuo al Snehaĝa, nova komisiito de TEJO

Snehaĝa estas nova komisiito pri scienco de TEJO! Ni faris kelkajn demandojn por ke vi pli bone konatiĝu kun ŝi! [...]

Mesaĝoj de Espero – Zamenhofa Tago 2020

Feliĉan Zamenhofan Tagon 2020! En nia nova video, esperantistoj el la tuta mondo sendas mesaĝojn de espero okaze de la Zamenhofa Tago (15-a de decembro). La jaro 2020 estis malfacila por multaj homoj tra la mondo kaj ni volas festi kun speciala ĝojo kaj optimismo la naskiĝtagon de la iniciatoro de la internacia lingvo Esperanto kaj la baldaŭan novan jaron 2021. [...]

Invitu IJK 2022 al via lando!

Kandidatiĝu kaj organizu kune kun TEJO la 78-an Internacian Junularan Kongreson en via lando en 2022! Por ke kandidatoj sentu sin pli certaj kaj kuraĝaj ni proponas du etapojn por sendi al ni viajn proponojn. [...]

Leteroj de niaj legantoj



Karaj ge-sinjoroj, mi estas ĝoja pro le recivo de TS revuo. Koran dankon. Ĝis revido, **Dr. Phung Manh Tien** el Vjetnamio



Multan dankon por la Turka Stelo revuo. Amike salutas, **Margarete Bastian** el Germanio



Koran dankon pro la regula plezuro legi vian revuon. Amike **Franciska Toubale** el Aŭstralio



Karaj, mi dankas pro la aperigo de fabelo de la hungara verkistino Anna Fazekas. Mi estas tre kontenta, kaj traleginte la ceterajn enhavaĵojn, mi jam nun ĝojas pro la riĉeco de via revuo. La anoncon pri via revueto decembro 2020a, mi plusendis kaj al la hungarlandaj babiladlistoj de geesperantistoj, kaj al miaj alilandaj geamikoj esperantistaj. Ĝis la nova eldonaĵo de TS mi ellegos la nunan. Ĉiom bonan! **Adri Pásztor** el Hungario



Dankon kaj pliajn sukcesojn al vi! Bondezire kaj altestime, **Gafur Mirzabaev** el Uzbekio



Karaj, mi gratulas ĉiujn kunlaborantojn pro la jubilea eldono de via revueto, kiu fakte iĝis

jam delonge revuo. Ĝi estas trezoro de interesaj artikoloj kaj ĉiaspecaj kontribuadoj kaj bona fonto de materialoj por kursgvidantoj. Aparte impresas min la vere internacia fono de viaj aŭtoroj. Ĉion bonan por la venontaj kvindek numeroj de via revuo. Kore kaj dankeme salutas, **Harald Schmitz** el Germanio



Dankon kaj gratulon pro la decembra numero. Tutkorajn bondezirojn al vi kaj al via familio okaze de Kristnasko kaj Nova Jaro. Amike, **Luiza Carol** el Israelo



Estimataj, mi dankas pro la sendita nova numero de Turka Stelo. Mi atente tralegis ĝin, ĝi estas bona. Samtempe mi volas gratuli vin okaze de kvinjariĝo de la revueto Turka Stelo. La redaktado kaj eldono postulas multe da tempo kaj atento. Ĝuste tion mi bondeziras persone al vi. Al ĉiuj eldonantoj: redaktoro, kontribuantoj kaj legantoj okaze de bela jubileo mi bondeziras sanon, esperon kaj paciencon kaj bonajn sukcesojn en sekvonta 2021 jaro. **Laimundas Abromas** el Litovio



Saluton, "Ora Ĵurnalo" salutas vin kaj Turka Stelo. Vi superas nian magazinon per du jaroj. Troviĝas bildo pri Turka Stelo en nia decembra numero: http://www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_Jxurnalo_n-ro_35.pdf **Siv Burell** el Svedio


Ciklo kun Hori Jasuo -- hajkoj kaj poemetoj de Elena Popova e Bulgario

Amika donac' el propra produktado. Salut' elkore. La senco de la vivo – ĝojo de la amikoj.




Hundo – gardisto. Ordono de l' patrino:

- Gardu la bebon! Sed, ĉu ĝi estas sana? Ĉu la virus' timiĝos?



Ho, maja tento – kuko kun freŝaj fragoj!... Dolĉa aĉeto. La Natur' ne avaras

por la laboremuloj...



verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



KINO, LA MONDA SCIENCO**KINO ESTAS GEOGRAFIO**

Eĉ se vi ne iros al la montoj, kanjonoj, dezertoj, riveroj, akvofaloj aŭ oceanoj, kavdratoj pafitaj el projekciilo brakumas la blankan ekranon kaj tiel vi atingas multajn landojn, kiujn vi neniam vizitis.

Vi ankaŭ povas viziti revajn landojn, kiuj ne troviĝas sur ĉi tiu mondo.

Unu bileto kaj unu sidloko.

Jen la tuta prezo por unu leciono.

KINO ESTAS HISTORIO.

Kleopatro kaj Antonio, Cezaro, Potemkin-Batalŝipo, revolucioj, sangaj bataloj, civilaj militoj, kavernuloj, gladiatoroj, muskedistoj, diplomaciaj skribotabloj, agentoj, intrigoj, skandaloj de ŝtatestroj, kamparana ribelo, lukto de ministoj, propaganda filmaĵo, Napoleono, Spartako, Dek Ordonoj, Alvoko, Vikingoj, Hititoj...

Fidela al la vero aŭ kun anakronismo...

Ĝi montras homon en la hieraŭo kaj hodiaŭo.

KINO ESTAS ZOOLOGIO

Birdoj, Alvoko de Sovaĝejo ("Call of the wild"), Mikrokosmo, Urso, Makzeloj ("Jaws")... Krotalo en la malfekunda lando, kie promenas vakeroj... Orangutangoj, amikoj de sciencistino... Cervoj rigardantaj al ni kun malgajaj okuloj... Vulpo, amiko de knabineto... Tagĵurnalo de Testudo... Ĉarma stratkato... Nigra Perlo... Viro Flustranta al Ĉevaloj... Tago de Delfenoj...

Medio, pere de kio vi povas brakumi multajn bestojn pere de nur unu bileto.

Kaj foje la MGM-leono muĝas kontraŭ vi komence de la filmo. "Ars gratia artis!" (el la latina: Arto por arto)

KINO ESTAS KRIMOLOGIO

Sherlock Holmes, Hercule Poirot, Murdo en la Orienta Eksprestrajno, La Malantaŭa Fenestro, La Viro kiu Sciis Multon, Samurajo, Ĉina Urbo, Sep, Talenta s-ro Ripley, La Nomo de la Rozo...



Murdo-enigmoj pere de nur unu bileto.

Miro, ekscito kaj problemsolvo.

KINO ESTAS PSIKOLOGIO

Vertiĝo, Alteco-Timo, Repuŝo, Silento, Kukolo... Internaj konfliktoj, retromemoroj, skribotablo de psikiatro, adoleskaj knaboj, introvertitaj junulinoj, kleptomaniaj riĉaj virinoj, obsedaj viroj, homoj kun traŭmato ankoraŭ ne solvitaj, edzoj kaj edzinoj en mezaĝa krizo... Homoj luktantaj kontraŭ mortiga malsano, homoj pelataj al memmortigo, homoj trenitaj post siaj memoroj... Sovaĝaj Fragoj, Naĝanto... Komedio kiu komencas pere de psikoterapio de iu mafia patro: "Analizu Ĉi tion!"

Ĝi estas la kamerao, kiu lumigas la mensojn kaj animojn.

KINO ESTAS MEDICINO.

Vojaĝo tra sangovaskuloj: Mirinda Vojaĝo, D-ro Jekyll, Pasteur, D-ro Frankenstein, D-ro Moreau, D-ro Bethune, La oleo de Laŭrenco, Elirigante la mortintojn, La Kuracisto...

Malicaj kuracistoj, pacientoj, kiuj atendas resaniĝon, la lukto de pacientoj, kuracistoj, kiuj malsaniĝis, la eksterordinara kuracisto, kiu estas ĝojo por la pacientoj kaj kiu uzas tute alian metodon: "Patch Adams"... Vekiĝoj ("Awakenings")... Ambicia kuracisto, kies filino havis akcidenton, ĉasas junulinojn, kiuj similas al sia filino, por fari al ŝi estetikan ĥirurgion, kuracisto kiu ofertas kelkajn homojn por la bono de unu: Okuloj Sen Vizaĝoj ("Les Yeux sans Visages")...

Nia vojaĝo al la korpo, cerbo, ĥirurgiejoj, kuracaj terminoj, kondiĉoj, malesperoj kaj solvoj.

La mondo de blankaj kamizoluloj sur la blanka ekrano ...

KINO ESTAS FIZIKO KAJ ASTRONOMIO

De la adapto de "Vojaĝo al la Luno" far de Georges Méliès ĝis hodiaŭ... "Aelita", "Spaca Aventuro 2001", "Solaris", "Interstellar" kaj multaj aliaj...

Tempomaŝino, "Fahrenheit 451", "Blade Runner", Matrico, La Teorio de Ĉio ...

Per nur unu bileto aŭ klako sur la komputila ekrano hodiaŭ, vi vojaĝas al senfinaj universoj,

>>30

La homoj kutimas ordinare direkti sian tutan atenton kaj admiron al la protagonistoj de ĉia ajn afero. Ili ne interesiĝas sufiĉe pri la duaroluloj forgesante aŭ nesciante, ke ties kontribuado je ĉio ajn estas eble ne same brila, tamen same esenca kun tiu de la ĉefrolulo. Krome, estas preskaŭ certe, ke ĉiu rolulo havas sian ŝancon montri iam sian tutan kapablon kaj meriton.



Mi diras ĉion tion ĉi pensante pri Eneo, la ne tre brila troja militisto kiu tamen iĝis la granda fondinto de unu el la plej gloraj gentoj aperintaj en la homa historio.

Eneo estis Trojano kaj por paroli pli ĝuste li estis Dardanano aŭ Dardanido. Mi eksplikas, ke la tuta loĝantaro de la tre granda troja lando konsistis el du frataj gentoj, kiuj havis la nomojn de la praaj fondintoj de la granda reĝlando, de Trojo (Τρωες) kaj de Dardano (Δάρδανος). La Trojanoj plejparte loĝis en la kampa regiono de la lando, en la pli dens-loĝataj lokoj, en la metropolo kaj ties vasta ĉirkaŭa teritorio kaj la Dardananoj loĝis plejparte en la monta landoparto kaj sur la deklivoj de la grada montaro Ido (Ιδῆ), kiu superelstaris la landon.

Eneo apartenis al la reĝa familio de Trojo, li estis nevo de la reĝo Priamo (Πρίαμος) kaj partoprenis la grandan defendan militon kontraŭ la Helenoj kiel armeestro de la Dardananoj.

Senduba protagonisto de tiu, longa, kruela milito, en la troja flanko, estis ja Hektoro (Ἕκτωρ), la granda heroo, ĝenerala militestro de la Trojanoj, la unua filo de Priamo kaj kron-princo de la reĝlando.


Eneo havis duan-trian rolon, tamen li posedis grandan atuton, li estis filo de la splenda diino de la belo kaj amo, Afrodita (Ἀφροδίτη), kiu, allogite de la eksterordinara beleco de Aĝhiso (Αγχιόης), sekskuniĝis kun li kaj naskis Eneon. Kompreneble la infano estis lasita al sia patro kaj estis edukita kaj prizorgita de sia grandaĝa fratino Hipodamia

(Ἰπποδάμεια). Malgraŭ tio, la diino, kiu aparte amis tiun sian belan filon, ĉiam, nevidate, atentis kaj protektis lin.

Eneo estis bona kaj sentima militisto, li estis viro kuraĝa, sed samtempe saĝa kaj atentema. Dum la tuta daŭro de la granda milito li militis kuraĝe, li oferis al la troja armeo sufiĉajn venkojn, tamen li neniam estis altirita al senkiala risko, li ne aspiris senfruktajn heroaĵojn. Tamen, li estis juna varm-sanga, do kelkfoje, malmult-foje, li tre serioze endanĝeriĝis. La unuan fojon kvazaŭ duele li batalis kontraŭ unu el la plej milit-spertaj kaj kuraĝaj helenaj militestroj, Diomedo (Διομήδης), kiu vundis lin serioze ĉe la femuro. La lastan momenton, nevidate intervenis Afrodita kaj mirakle savis lin. En alia okazo, entrepreninte neatenditan sturmon celantan la forbruligon de la helena floto, li subite frontis al la terura Ajakso (Αΐας), la plej forta helena heroo, li kuraĝe kontraŭstaris, sed, tre prudente, post nelonge retiriĝis. Tamen, la plej kriza momento estis kiam li alfrontis sur la tereno de ekstreme violenta batalo la plej grandan, nevenkeblan kaj nevundeblan helenan heroon, Aĥilon (Αχιλλεύς). En tiu okazo Eneo perdis sian prudenton, li komencis batali, eĉ de proksime, kontraŭ la terura kontraŭulo kaj estis tute certe ke post nelonge li pereus, tamen, ankoraŭfoje li estis mirakle savita. La homoj diradis, ke estis la dio de la maro, Pozidono (Ποσειδών), kiu, sendita de Zeŭso (Ζεὺς) mem, fortiris Eneon malantaŭ la trojan muregon. Ĉiuj kredis, ke la reĝo de la dioj favoris la Helenojn, li ne simpatiis la Trojanojn, sed li ne deziris la pereon de la dardana gento.

Mi ne diros pli multon pri la militaj atingoj de Eneo, plej interesa estas lia postmilita historio.

Do, kiam, la plej forta militestro kaj ĉefa espero de la Trojanoj, la armeestro Hektoro estis mortigita de Aĥilo, la plej prudentaj Trojanoj komprenis, ke ĉio estas perdita. Malgraŭ tio, la milito daŭris ankoraŭ longe, sed Eneo, saĝe pensante, donis la taŭgajn ordonojn kaj organizis la laŭordan foriron de la senarma parto de la Dardananoj al la altaĵoj de la monto. Li kaj lia armeo restis en Trojo kaj daŭrigis la militon ĝis la fino, ĝis kiam la Helenoj ŝajne foriris, lasinte post si la dolan Lignan Ĉevalon (Δούρειος Ίππος). Eneo ne partoprenis la ĝeneralan entuziasmon de la trompitaj Trojanoj, rapide li organizis ĉion kaj kun ĉiuj liaj samfamilianoj, parencoj, kunuloj kaj fidelaj armeanoj foriĝis al la monta Dardanio. Kompreneble ĉio tio ĉi ne estis facila afero, ĉar la sekureco estis sur la krutaj, neireblaj mont-



deklivoj, kie la Helenoj ne povus ilin persekuti. Notinde, ke Eneo mem portis sur siaj ŝultroj sian maljunan, senpovan patron.

La Helenoj ne entreprenis persekuton de la rifuĝintoj, tiele Eneo savis sian genton de la totala perejo kiun suferis la naivaj Trojanoj. Sur la monto, la Dardananoj sekure atendis la definitivon foriron de la malamiko kaj kiam tio okazis, al la tute detruita lando revenis ankaŭ la du lastaj nepoj de Priamo, la solaj membroj de la reĝa familio, kiuj estis savitaj en Lidio (Λυδία). La du reĝidoj renkontiĝis kun Eneo kaj siaj ceteraj parencoj, kaj sciigis sian intencon rekonstrui Trojon kaj revivigi la regnon kaj genton de Priamo.

Eneo ne plu havis lokon en Trojo, li, do, decidis foriri kaj serĉi novan patrujon por la gento de la Dardanidoj. Kompreneble, tio postulis konstruadon de multaj ŝipoj, do, pasis longa tempo, sed iam ĉio estis preta kaj la ŝiparo ekiris.

Afrodita, pere de ŝonĝo konsilis sian filon sekvi la vojon de la suno, tiel Eneo ŝipiris okcidenten. Li trapasis Helesponton (Ελλήσποντος) kaj atingis Palenon (Παλήνη), amikan urbon, en kiu li travintris. Foririnte de Paleno li atingis la Termaisan (Θερμαϊκός) Golfon kie mortis la maljuna Agĥiso. Eneo enterigis sian patron, oferinte al li la reĝajn honorojn kiujn li rajtis. La homoj tamen diradis, ke Afrodita, kiu neniam forgesis sian flaman kuniĝon kun tiu belega viro, post lia morto donis al li la senmortecon kaj la eternan junecon kaj enloĝigis lin en Elizeo (Ηλίσια Πεδία), la lando de la eterna feliĉo.

Post tio, Eneo daŭrigis sian iradon ĝis la lando de la Brusoj en Macedonujo (Μακεδονία), nomata Brusiso (Βρουσίς), kie li fondis urbon al kiu li donis sian nomon.

Daŭriginte la ŝipiradon li atingis Deloson (Δήλος) kaj ankaŭ tie, en la sanktigita insulo de Apolono, restis longe, sub la protekto kaj gastigado de la fama aŭguristo Anio (Ἄνιος). Oni diris, ke kiam Eneo foriris, Anio donis al li multajn donacojn sed ankaŭ unu el siaj filinoj, Lavnan (Λαύνα) aŭ Lavinian (Λαβινία), kiu, estante ege kapabla aŭguristino, povis ĝuste antaŭvidi kaj konsili la heroon dum lia longa vojaĝo. Oni ankaŭ diris, ke en Deloso, Eneo seks-kuniĝis ankaŭ kun alia filino de Anio, kiu, post la foriro de la Trojanoj, naskis filon de Eneo, al kiu estis donita la nomo Andro (Ἄνδρος). Laŭ la orakolo de Apolono, donita de la fama sanktejo-divenejo de Deloso, Eneo kun lia popolo devis iri kaj enloĝi en la naskiĝloko de liaj plej praaĵ antaŭuloj. Eneo memoris ke iam li estis aŭdinta de Agĥiso, ke la praa heroo, kiu estis doninta sian nomon al la Trojanoj-Teŭkroj, estis Teŭkro (Τεύκρος), heroo devenanta de Kreto (Κρήτη). Do, obeante al la orakolo, li direktiĝis tien.



Atinginte Kreton, Eneo kaj la tuta troja popolo kiu lin sekvis, enloĝiĝis en regiono de la norda marbordo de la granda insulo, kie li fondis kaj fortikigis urbon al kiu li donis la nomon Pergamo (Πέργαμος).

Ĉiuj estis certaj, ke la gento de Eneo estis finfine en sia praa propra patrujo, tamen, post tempo, komencis prezentiĝi sinistraj signoj. La plantoj, en la tuta lando, ĉesis doni fruktojn, multaj homoj komencis morti la unu post la alia, sen evidentaj signoj de malsano, ĉio, do, montris, ke plago minacas la popolon.

Eneo komprenis, ke li devas peti novan konsilon de Apolono kaj li estis preta iri tuj al Deloso. Tamen, la nokton, en lia sonĝo prezentiĝis al li Hestia (Ἑστία) la diino-protektanto de la hejmo kaj la familia vivo kaj eksplikis al li, ke li ne komprenis ĝuste la orakolon de Apolono, ĉar la naskiĝloko de la plej praaĵ antaŭuloj, de la kreintoj de la gento de Dardano estis ne Kreto, sed Hesperio (Ἑσπερία) kaj Hesperio estis nomataj la landoj estantaj okcidente de Helenujo. Post tio, Eneo sciis bone kion li devas fari, do, lasinte en Pergamo nur tiujn kiuj deziris resti tie kaj tiujn kiuj ne plu povis, pro diversaj kialoj, daŭrigi la tre lacigan vagadon, enŝipigis denove sian popolon kaj ankoraŭfoje ekiris, daŭrigante la serĉadon de la nova troja patrujo.

Navigante al Hesperio, li atingis unue la marbordojn de Lakonio (Λακωνία), nome la sudorientan parton de Peloponezo (Πελοπόννησος), en la orienta loko de kiu li fondis civiton, al kiu li donis la nomon Afrodiziaso (Ἀφροδισιάς), dediĉinte ĝin al sia patrino. Daŭrigante la ŝipiradon, li atingis Aktion (Ἄκτιον), kabo ĉe la enirejo de la Ambracia (Ἀμβρακικός) Golfo, kie li fondis grandan templon dediĉitan al Afrodita.

Antaŭ ol atingi la marbordon de Hesperio, Eneo haltis kaj restis kelkan tempon en Zakinto (Ζάκυνθος), kie li estis kun entuziasmo kaj ĝojo akceptita de la loĝantoj de la insulo kies gentopatro estis Zakinto, unu ankoraŭ Dardanido, do, malproksima antaŭulo de Eneo. Sur la parenca insulo li fondis unu ankoraŭ

templon dediĉitan al sia patrino.

Do, post longa tempo, Eneo atingis la marbordon de Hesperio, Japigion (Ἰαπυγία), la plej proksiman al Helenujo loko de Italujo kaj elŝipiĝis en haveno, kiu ricevis la nomon de Afrodita. De tie, li komencis travojaĝi per siaj ŝipoj paralele al la orienta bordo de Italujo suden kaj atingis Sicilion

De Sicilio la Trojanoj ŝipiris norden kaj kiam ili atingis taŭgan lokon ĉe la estuaro de la rivero Tiberio kaj la popolo elŝipiĝis, grupo da virinoj, sub la estrado de iu Trojanino nomata Roma (Ρώμη), metis fajron kaj ekbruligis multajn el la ŝipoj, por devigi la virojn ĉesigi la senfinan, tiom penigan kaj ne plu elteneblan vagadon de la popolo. Honore al tiu kuraĝa virino, pli poste, Eneo fondis la urbon Romo.

Tie, do, la ĉefoj de la ekspedicio kolektiĝis por interkonsiliĝi kaj kune manĝi. Ĉar ili ne posedis tablojn nek benkojn, ili sternis sur la tero iajn platajn panojn kaj sur tio ili metis la manĝaĵojn. Ĉar la viroj estis tre malsataj aŭ ĉar la manĝaĵoj estis malmultaj, ili manĝis ĉion kaj kiam restis nenio alia, ili manĝis ankaŭ la platajn panojn sur kiuj estis metitaj la manĝaĵoj. Tiam, unu el la kunuloj diris: “rigardu, eĉ la tablojn ni manĝis!”

Kiam Eneo aŭdis tion, sokiĝis, ĉar li ekmemoris, ke dum ilia vagado, kiam ili trapasis Hepiron (Ἥπειρος) kaj haltis en la mond-konata, granda sanktejo de Zeŭso en Dodono (Δωδώνη), por peti de la tiea divenejo, orakolon-konsilon de la granda dio pri la serĉata nova patrujo, ili akceptis strangan orakolon kiun neniu povis tiam ekspliki. La dio tiam estis dirinta jenon: “iru okcidenten kaj kiam vi atingos nekonatajn bordojn, en la loko kie viaj kunuloj sentos tian malsaton, ke ili formanĝos ankaŭ la tablojn, restu kaj fondu tie vian novan patrujon!”

La ekspliko, do, de la stranga orakolo estis donita al Eneo, kiu decidis ĉesigi tie la vagadon.

Tuj kiam li ricevis tiun decidon, li donis ordonojn, ke oni pretigu ĉion por ke li faru solenan sanktoferon al Zeŭso. La elektita viktimo estis tre granda, nigra, graveda porkino, kiu estis kondukita ĉe la altaro. Kiam ĉio estis preta, kiam Eneo prenis la tranĉilon, la besto subite deliberiĝis kaj komencis kuri sur ascendaĵo. Eneo kaj liaj kunuloj sekvis la beston, kiu, atinginte altan lokon, haltis kaj tie naskis tridek porkidojn.

Tio ŝokis ankoraŭ pli multe Eneon, kiu, de la sanktejo de Dodono, estis ricevinta ankaŭ duan orakolon, laŭ kiu li devas meti la fundamentojn de la unua civito kiun li fondos, en la punkto, kiun montrus al li unu besto. La diaj signoj estis, do, tute klaraj, tamen Eneo ne estis kontenta, ĉar la loko ŝajnis al li ne taŭga, ankaŭ ĉar ĝi estis malproksime de la maro.

Do, li enfundiĝis en pezaj, malagrablaj pensoj, sed tiam, el la densa arbaro de la deklivo li estis aŭdinta misteran voĉon, kiu diradis al li, ke li nepre devas ĝuste tie konstrui la novan sian urbon, ĉar de tiu



punkto iompostiome etendiĝos al preskaŭ la tuta mondo la grandega, grandioza, plej potenca lia nova regno, kiun ĝuos li kaj dum multaj jarcentoj liaj posteuloj.

Post tio Eneo konvinkiĝis kaj fondis sur la monteto urbon al kiu li donis la nomon Lavinio honore al Lavna aŭ Lavinia, la aŭguristino el Deloso, kiu antaŭ nelonge estis mortinta tie. Tiu urbo, multe pli poste iĝis la politika kaj religia centro de la tuta Latio (Λάτιον).

Kelkaj diradis ke la tridek porkidoj simbolis la tridek jarojn kiuj pasis ĝis kiam la filo de Eneo Askanio (Ἀσκάνιος) konstruis la grandan urbon Albalongo (Ἀλβα-Λόγγα). Aliaj diradis, ke tiuj tridek porkidoj simbolis la tridek civitojn kiujn fondis Eneo en Latio.

La orakolo de la granda dio estis tute ĝusta. En Latio estis finita la vagado de Eneo, kiu, kvankam duarolulo de la Troja Milito iĝis la brila fondinto de grandioza regno, kiu dum multaj jarcentoj regis surer sennombraj landoj kaj popoloj.

Pri la sorto kaj vagado de Eneo estas multaj versioj. Estas multaj helenaj verkistoj, kiuj kreis miton pri la troja heroo, ĉiu el ili laŭ sia opinio, vidpunkto, tendenco, kreraĵto, ĉar ekzakte tia estas la karaktero de ĉiu mito; ĉiam temas pri rakontado ripetata kaj ripetata, daŭranta dum jarcentoj kaj jarmiloj, kaj ĉiu rakontanto estas samtempe kreanto de sia propra vero, de unu nova versio. Estas, do, komplekso da opinioj kaj ideoj pri la sama afero aŭ persono, tamen ne interligitaj logike. Kompreneble, pri Eneo estas skribita ankaŭ la granda epopeo de Vergilio kaj signifaj verkoj de aliaj romiaj poetoj, tamen ĉio tio ĉi ne estas parto de la helena mitologio.

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

La rekordulo de nia literaturo



István Nemere (naskita en 1944) estas profesia verkisto de romanoj en du lingvoj, sia gepatra hungara kaj Esperanto. En la hungara aperis de li preskaŭ 200 libroj, kaj en Esperanto ĝis nun 19 romanoj kaj kelkaj noveloj, kio faras lin rekordulo de la Esperanta rakonta literaturo. Laŭ informo, liaj verkoj estis tradukitaj en almenaŭ dekon da lingvoj. Li estas ankaŭ produktema tradukisto el la pola lingvo en la hungaran.

Kiel junulo Nemere laboris interalie pri sekado en kadavrejo kaj pri flegado en medicina urĝejo. Li loĝis en Pollando dum ses jaroj, kie li laboris interalie kiel interpretisto. Li edziĝis al pola esperantistino, probable li lernis Esperanton en tiu tempo. Post lia reveno al sia patrujo en sia trideka jaro, komenciĝis lia verkista okupiĝo. Sian unuan hungarlingvan libron li aperigis en 1974. Tio estis la komenco de lia kariero kiel verkisto en tiu lingvo. La senĉeso de lia produktado de romanoj en la hungara klare indikas, ke liaj verkoj estis favore akceptataj de la hungaraj legantoj. Sed Nemere ne estis kontenta esti enfermita en lingvo, kiun malmultaj konas ekster Hungarujo. Li serĉis internacian legantaron. Jam lerninte Esperanton li tial decidis uzi sian talenton por verki en la internacia lingvo. Tiu decido pruviĝis bonfara por la proza literaturo en Esperanto kaj la rezulto daŭre pretas servi kiel instrua ekzemplo por verkemaj aspirantoj.

La unua Esperanta libro de Nemere aperis en 1981, novelaro titolita La naŭa kanalo. Ĝi enhavas 31 novelojn de diversa longeco. Tiuj unuaj provoj, kvankam diversnivelaj, estis gratulindaj aldonoj al la maldensa vico de Esperantaj prozverkoj. Tio pli definitive pruviĝis per la unua romano de Nemere, La fermita urbo, kiu aperis en la posta jaro. Jam en la menciita novelaro konstatablas lia inklino al sciencfikcio, kaj lia unua romano estas precize tia. Ĝia okaz-

tempo estas la dudeksesa jarcento, la ĉefpersono trovas urbon kaŝitan, kie la homoj vivas laŭ mezepokaj kondiĉoj, kaj kie li trapasas ekscitajn aventurojn. La rakonta stilo estas konciza, la agado ĉiam havas la ĉefan rolon kaj facile kaptas la atenton de la leganto. La romano estas unuavice distra legaĵo kaj atestas pri la profesia tekniko de la aŭtoro en kreado de okazara rakont-fadeno, kiu facile tenas vigla la intereson. Tiaj libroj estas ja bonvenaj al junaj Esperanto-legantoj kaj meritas ĉian laŭdon. Kaj certe junaj verkistoj povas multon lerni de lerte uzata rakonta tekniko. Jen mallonga ekzemplo: Mark, la ĉefpersono, malsupreniras profundan ŝakton por esplori suban misteron:

Suben rigardante, Mark vidis nigran malplenon. La lanternon li hakis al sia brusto, la ŝnuregon laŭbezone lasis fali suben, metron post metro. Li ne aŭdis jam eksteran venton; ega silento regis. Lia korpo foje-foje turniĝis, sed en la lumo de la lanterno li vidis ĉie nur grizan betonon. Li perdis sian temposenton, sed li rigardis la horloĝon. Trankvile li descendis plu.

La listo de la romanoj de István Nemere estas longa, li certe tenas rekordon inter Esperantaj prozverkistoj. Ofte du libroj aperis samjare, La blinda birdo kaj Sur kampo granita en 1983, Febro kaj La monto en 1984, Sercu mian sonĝon kaj Terra en 1987, tiel oni povas elnombri la 19 romanojn ĝis Jesa kaj Serpentoj en la puto en 2009. Nu, tre povas esti, ke iuj el liaj Esperanto-romanoj estas liaj propraj tradukoj de liaj hungarlingvaj romanoj, sed tio neniel malgravigas lian statuson kiel Esperanto-verkisto. Jam pli ol tridek kaj duonon da jaroj Nemere ne ĉesis mirigi la Esperantistan legantaron per sia produktemo, sed li meritas pli ol primiron, li meritas senrezervan admiron. Ni esperu, ke Nemere ankoraŭ longe daŭrigos provizi siajn admirantojn per pliaj mens-okupaj verkoj.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/nemere.html>

DUA PARTO - LA VIVO

77



La Taŭo de la ĉielo, kiom ĝi similas
al la streĉanto de pafarko!
La altan li premas malsupren,
la suban li altigas;
tio, kio ne havas sufiĉe, li kompletigas.
La Taŭo de la ĉielo estas
malpliigi tion, kio havas tro
kaj tion, kio havas maltro pliigi.
La Taŭo de la homoj ne estas tia.
Ĝi malpliigas tion, kio ne havas sufiĉe
por oferi ĝin al tiu, kiu havas tro.
Sed kiu estas kapabla, tion,
kion li havas tro oferi al la mondo?
Nur tiu, kiu havas la TAŬON.

Tiel agas ankaŭ la saĝulo:
Li agas kaj ne retenas ion.
Se la verko estas kreita, li ne restadas ĉe ĝi.
Li ne deziras montri sian gravecon antaŭ aliaj.

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Sed kiu estas kapabla, tion,
kion li havas tro oferti al la mondo?“
Pri tiu ĉi frazo, mia opinio la traduko de Wang
Chongfang estas pli preciza:
„Kiu do povas doni el la pli-ol-sufiĉo al la mondo?“

(daŭrigota)

La kravato

Kiam sinjoro Pedro eniris la turisman agentejon por antaŭmendi sian vojaĝon al dezerto Saharo, li ne povis imagi, ke li estas perdiĝonta tra la nenombreblaj sablaj dunoj de tiu varmegejo.



Alveninte Egiptujen, nia dezertulo feliĉe surkameliĝis kaj karavan-aniĝis, sed malbonŝance por li, en la vico de tiu kamelaro li estis ĝuste la lasta, do kiam lia ĝiba kvarpieda veturilo survoje decidis malŝarĝi iom da balasto ĵetante lin sablen, neniu rimarkis tion, kaj antaŭ ol li rekonsciigis el la brutala falo, la karavano jam estis tro malproksime, kaj li troviĝis tute sola, inter skorpioj kaj serpentoj.

La afrika Suno marteladis senkompate, kaj marŝinte tra la dezerto multajn mejlojn, Pedro baldaŭ eksentis grandegan soifon. Ve! Kion li donus por trinki eĉ malmultajn gutojn da akvo!!!

Subite, ie en la flava horizonto, Pedro ekvidis ion briletantan...kio estas tio? Li demandis al si mem..eble iu, kiu povas savi min! Sekbuŝe, li rapidigis sian marŝadon celante tiun. Sed granda estis la surprizo de Pedro kiam, atinginte tion, li malkovris, ke ne

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

temas pri savulo, sed pri vendisto de kravatoj. Jes, strangege, tie en la mezo de la dezerto, estis kravat-vendisto, sub granda ombrelo, kiu ridetante al li, demandis: - Kravaton, sinjoro?



Pedro bezonis kelkajn sekundojn por respondi, tial, ke tiom neatendita estis tio, kaj iom balbute li nur kapablis diri: - A... a... akvon... bonvolu...

- Bedaŭrinde, sinjoro, mi ne havas akvon... mi nur havas kravatojn. Ĉu vi volas aĉeti kravaton?

Pedro, ne kredante siajn okulojn, kaj orelojn, foriris, kaj parolante al si mem, li diris: verŝajne, tio estis miraĝo, iluzio pro la forta suno! Plurfoje mi aŭskultis tiajn rakontojn, kaj eble nun tio okazas al mi!

Dum tiel li klopodis klarigi la aperon de tiu vendisto meze de la dezerto, jen malproksime, alian briletantan ion li ekvidis. Li komencis krei – hejjjj helpu! Helpuuuuu miin!

Sed ankoraŭ pli granda estis lia surprizo kiam, proksimiĝinte, li komprenis, ke denove temas pri alia vendisto. Vendisto de kravatoj. Tie, en la mezo de Saharo.

- Kravatojn, sinjoro? Mi havas belegajn kravatojn, el silko, el kotono, el kaŝmiro... ruĝaj, verdaj, nigraj, ĉiuj koloroj... malmultekoste, sinjoro, ĉu vi volas aĉeti?

Pedro ege koleriĝis, kaj kaptite de eksplodo de furiozeco, li piedbatis renversante la tableton sur kiu kuŝis la kravatoj de la vendisto, kiu pro la timo ekkuris for, dum Pedro blekis al li - diable! Vi malbenito! For de mi filo de grandega porkino! Akvon! Mi volas akvon! Ne viajn stultajn kravatojn!

Sed la postkuro ne daŭris longe. Pedro frue troviĝis senspira pro la soifo kaj haltis, dum la vendisto malaperis malantaŭ sabla monteto.

- Pli da Miraĝoj!! diris Pedro al si mem, kiam li finfine trankviliĝis..Kuraĝe Pedro! Ne kapitulacu!

Kaj tiel li faris. Pliajn mejlojn li plu marŝis. La soifo estis nun ege netolerebla kaj li sentis, ke baldaŭ li mortos kiam..jen, tie, en la horizonto... io... briletanta!

Ne..ĉifoje ne povas esti miraĝo..diris Pedro kun voĉo tremetanta..kaj trenante sin mem, rampante tien per siaj lastaj fortoj, li malkovris, ke ĉi foje vere ne temas pri miraĝo! Tio, kion li vidis, estis granda trinkejo, jes, trinkejo, meze de la dezerto, kaj tra la fenestroj vitraj li povis vidi ĉiajn trinkaĵojn inter la

manoj de la klientoj ĉe la tabloj, el la fridujoj kelneroj prenadis limonadojn, malvarmajn fruktosukojn kokakolojn..

Pedro lekis siajn lipojn aridajn kaj englutis sian lastan salivon, sed ĝuste kiam li estis preskaŭ enirinta la trinkejon, granda forta mano prenis lin ĉe la kolo kaj puŝis lin malantaŭen

- Ehi vi, kien vi pensas iri? Diris mastodonta gardisto malĝentile

- En... en la trinkejon... respondis Pedro timigite...

Ne! Vi ne povas. Ĉi tien nur povas eniri klientoj kun kravatoj, severe deklamis la gardisto...

tradukis kaj sendis **Maurizio Brucco** el Britio

Koko kaj Perlo

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

La Koko dum bekad' senĉesa
En sterko trovis perlon laŭ okaz'
Kaj diras grave kun emfaz':
"Jen aĵo malnecesa!
Stultuloj taksas ĝin per tute granda prez',
Sed estas multe pli prefera por enspez'
Hordea simpla grajn': ne multe ĝi imponas,
Sed saton donas.
Por sensciul' similas paralel':
Gravaĵo sen kompren' nur ŝajnas bagatel'.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Ŝercoj



Kruko vekigis kaj malfermas unu okulon:
Ho, estas nova tago! La eblecoj estas
senlimaj! Estas tago de espero!

Jozefino turniĝas en la lito: Estas nur la 4a kaj duono.
Kruko refermas la okulojn: La espero povos atendi.

* * *

Kruko: Banĉjo, ĉu vi memoris fari tiun raporton?

Baniko: Kompreneble ke jes, Kruk'. Mi havas bonegan
memorkapablon, kiel tiu.... kiel tiu... kiel tiuj grandaj
grizaj bestoj kun rostro!

* * *

Baniko: Kiam mi estis tre juna kaj malfacile ekdormis
nokte, mia panjo venis en mian
ĉambron kaj ludis lulkantojn.

Kruko: Tre agrable.

Baniko: Nu, la nura instrumento kiun
ŝi kapablis ludi estis... la cimbaloj.

* * *

Baniko: Oni diras ke la vivo estas
ludo, kaj ke ni ĉiuj estas ludantoj.

Kruko: Ja, kiel en Ŝekspiro. Kaj do?


Baniko: Nu, se tio estas vera, do mi ludas damludon...
dum ĉiuj aliaj ludas ŝakon!

* * *

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anedotoj@googlegroups.com





Smartfono

„Ha, Mojo, li nur volas ankaŭ havi tian ludilon“. Volker kaj Irene mirigite turniĝis. Estis la komento de la bestozorgisto, kion ili aŭdis. Li venis por ekokupi sian skipon kaj prezentis sin al la du kunstudentoj.

„Saluton, mi estas Tim. Mi jam delonge laboras en tiu sekcio. Estas tre bone, ke niaj studentoj venas nun ankaŭ ekster la oficialaj universitataj aranĝoj nur por vidi niajn bestojn“.

„Ĉu li vere volas havi smartfonon?“, demandis Volker surprizite.

Tim nur povis konfirmi tion: „Ĉiufoje, kiam vizitanto eligas sian smartfonon, Mojo iĝas freneza. Mi pensas, iam ni devas donaci tian aparaton al li“.

„Kial ne? En mia hejmo certe troviĝas unu, kiun neniu plu uzas. Ĉu mi rajtas kunporti ĝin morgaŭ?“, demandis Irene.

Tim permesis tion, sed li aldonis: „Nu, ja, sed tio signifas denove plian laboron por mi. Mi devos konstrui etan keston kun kontaktskatolo, kun konekto al la plato por ŝargi la aparaton. Mi esperas, ke via malnova smartfono minimume povas esti sendrate ŝargita“.

La venontan tagon Irene kunportis smartfonon kaj donis ĝin al la bestozorganto. Tiu diligente ĝustatempe preparis la ŝargeblon por la poŝtelefono. La kesto eĉ havis pordon kaj seruron kun eta klavaro. Tim metis la smartfonon en la keston kaj demonstris la

servadon al Mojo. Li bezonis nur unu 'lecionon'.

Mojo tuj komprenis ĉion. Li senprobleme uzis la tri ĝustajn klavojn por malfermi la pordon. Scivoleme li enrigardis la keston, kaptis la smartfonon kaj triumfe tenis ĝin alten. Li gaje saltis kaj hopis.

Tio estis la ĉesigo de ĉiu komunikado inter la studentino kaj Mojo. La ĉimpanza knabo hodiaŭ ne plu volis ludi aŭ daŭrigi la kontakton. Iomete elrevigita Irene forlasis la instituton kaj raportis al Volker: „Nun ni povas lasi lin sola. Li ja havas la smartfonon. Eventuale ni vizitu lin morgaŭ“. Sed ankaŭ dum la venontaj tagoj ne eblis rekomenci la kontakton. Nur per freŝaj vinberoj la bestozorganto sukcesis forlogi Mojo de la aparato. Ĉiun vesperon Tim tiam metis la poŝtelefonon en la keston kaj fermis la pordon. Mojo devis ankoraŭ lerni, ke de tempo al tempo la akumulatoro devas esti ŝargita. Sed kiel klarigi tion al li? Iom post iom Mojo alktimiĝis al la vesperaj smartfonaj paŭzoj. Sed por tio li nepre bezonis vinberojn.

Post la prelego la eta studenta grupo denove renkontiĝis en la 'kafo-angulo'. Ĉiu jam aŭdis la novaĵon pri la inteligenta ĉimpanzo. Volker kaj Irene ne havis ŝancon por ĝui la trinkaĵon. La tutan tempon ili devis raportiri pri sia observado.

Sven intervenis: „Bone, se Mojo ne plu volas ludi kun vi, ne estas kaŭzo por neglekti la sporton. Lasu lin sola!“

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

17>> ĉefoficiro. – Ni flugos tien nur kelkajn horojn kaj tie ni vidos, kio estas farenda.

Li kunprenis la nigran korvon, dankis la reĝon de birdoj kaj eksidinte sur la selo, ekveturis li por serĉi la reĝidinon. Post kelkaj tagoj li atingis la verdan arbaro ĉirkaŭitan per alte-altega muro. Kiam li klakis per la vipo, ĉiuj muroj detruigis kaj ili ekestis ĉe la vitra palaco. Subite la korvo svingis per flugiloj kaj transformiĝis al homo. Li metis sian manon sur la oficira ŝultro kaj diris:

- Mi estas tiu mizerulo, kiun la senkora posedanto de la drinkejo forpelis el la domo kaj kiun vi kompatis pagante mian ŝuldon kaj donis monon por la sepulto. Esta mi, kiu montris al vi la ensorĉitan bienon,

estas mi, kiu sendis al vi tri viretojn, por ke vi akiru la miraklajn aĵojn- la selon, la mantelon, kaj la vipon, kaj helpis vin trovi la reĝidinon. Tio estas mia danko pro via bona koro.

Li flagris kvazaŭ stelo kaj malaperis el la oficiraj okuloj. Kaj li vestiĝis per la mantelo, iĝis nevidebla kaj eiris en la palacon, kie lin atendis la reĝidino. Finiĝis ĉiuj sorĉoj kaj ili vivis longe kaj feliĉe, neniam forgesante siajn gepatrojn, kiujn ili ofte vizitadis.

tradukis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio

Franco KAFKO (Franz Kafka)
Interparolo kun la ebruiulo

Kiam mi etpaŝe iris el la dompordo, surprizegis min la ĉielo kun luno kaj steloj kaj granda volbaĵo kaj la Ringplatz¹, kun urbodomo, marikolono kaj preĝejo.

Mi iris trankvile el la ombro en la lunlumon, malbutonumis la surtuton kaj varmigis min; poste per levo de la manoj mi mutigis la muĝadon de la nokto kaj komencis pripensi:

“Kion pri vi, kial vi faras, kvazaŭ vi ekzistus reale. Ĉu vi volas kredigi min, ke mi estas nereala, komike staranta sur la verda pavimo? Sed tamen estas jam antaŭ longa tempo, ke vi ekzistis vere, vi ĉielo, kaj vi Ringplaco neniam vere ekzistis.”

“Estas ja vere, daŭre vi superas min, sed tamen nur kiam mi lasas vin trankvilaj.”

“Dank’ al dio, luno, vi ne estas plu luno, sed eble mi estas malĝentila nomi vin lunnomatan ankoraŭ luno. Kial vi ne plu estas tiel orgojla, kiam mi nomas vin ‘forĝesita paperlaterno en kurioza koloro’. Kaj kial vi preskaŭ retiriĝas, kiam mi nomas vin ‘marikolono’ kaj mi ne plu rekonas vian minacan sintenon marikolono, kiam mi nomas vin ‘luno, kiu ĵetas flavan lumon’.”

“Vere ŝajnas nun, ke pensado pri vi ne bonfartigas vin; viaj kuraĝo kaj sano malpliigis.”

“Dio, kiom bonfartige devas esti, se pensanto lernas de ebruiulo!”

“Kial ĉio fariĝis silenta. Mi kredas, ke ne plu estas vento. Kaj la dometoj, kiuj ofte kvazaŭ sur etaj radoj ruliĝas tra la placo, estas tute fiksrakitaj - silento - silento - oni tute ne plu vidas la fajnan, nigran strion, kiu alie disigas ilin de la grundo.”

Kaj mi ekkuris. Mi kuris senbare trifoje ĉirkaŭ la granda placo, kaj ĉar mi ne renkontis ebruiulon, mi kuris, sen malpliigi la rapidon kaj sen senti penon, kontraŭ la Karlsgasse². Mia ombro kuris ofte pli malgranda ol mi apud mi ĉe la muro, kvazaŭ en kavovojo inter muro kaj stratogrundo.

Kiam mi preterpasis la domon de la fajrobrigado, mi aŭdis bruon devenanta de la Kleiner Ring³, kaj kiam mi tien envojiĝis, mi vidis ebruiulon stari ĉe kradaĵo de puto, tenante la brakojn horizontalaj kaj per la piedoj, kiuj troviĝis en lignaj pantofloj, stamfante sur la teron.

Mi unue haltis por trankviligi mian spiradon, poste mi iris al li, deprenis mian cilindran ĉapelon de la kapo kaj prezentis min:

“Bonan vesperon, delikata nobela moŝto, mi estas dudektri-jara, sed mi ankoraŭ ne havas nomon. Sed vi certe venas kun mirigaj, eĉ kanteblaj nomoj el tiu granda urbo Parizo. La tute nenatura odoro de la gliĉpaŝa kortego de Francujo ĉirkaŭas vin.”

“Vi certe vidis kun viaj ŝminkitaj okuloj tiujn grandajn damojn, kiuj jam staras sur la alta kaj hela teraso, en svelta talio ironie retrorigardante, dum la fino de ilia ankaŭ sur la ŝtuparo sternita pentrita trenaĵo kuŝas ankoraŭ sur la sablo de la ĝardeno. - Ĉu ne, sur longaj stangoj, ĉie dissemitaj, servistoj tretas en grizaj maldece tajloritaj frakoj kaj blankaj pantalonoj, kun la kruoj ĉirkaŭ la stangoj, sed la supran korpoparton ofte klinitaj malantaŭen kaj flanken, ĉar ili devas per ŝnuregoj levi de la tero kaj alten streĉi gigantajn grizajn toltukojn, ĉar la granda damo deziras nebulan matenon.” Ĉar li ruktis, mi diris preskaŭ ektimigite: “Vere, ĉu estas la vero, vi venas sinjoro el nia Parizo, el la ŝtorma Parizo, aĥ, el tiu reviga hajlovetero?” Kiam li ree ruktis, mi diris embarase: “Mi scias, okazas al mi granda honoro.”

Kaj mi butonumis rapidfingre mian surtuton, poste mi parolis arde kaj timeme:

“Mi scias, vi ne konsideras min inda je respondo, sed mi devus vivi plorindan vivon, se mi hodiaŭ ne demandus vin.”

“Mi petas vin, tiel ornamita moŝto, ĉu estas vere, kion oni rakontis al mi. Ĉu en Parizo ekzistas homoj konsistantaj nur el ornamitaj vestaĵoj kaj ĉu ekzistas tie domoj, kiuj havas sole portalojn kaj ĉu estas vere, ke dum somertagoj la ĉielo super la urbo estas fuĝe blua, plibeligita nur per alpremitaj blankaj nubetoj, kiuj havas ĉiuj la formon de koroj? Kaj ĉu ekzistas tie panoptiko kun granda furoro, en kiu staras nur arboj kun la nomoj de la plej famaj herooj, krimuloj kaj enamiĝintoj sur etaj alpendigitaj tabuloj.”

“Kaj jen ankoraŭ tiu novaĵo! Tiu evidente mensoga novaĵo!”

“Ĉu ne, tiuj stratoj de Parizo estas subite disbranĉigitaj; ili estas maltrankvilaj, ĉu ne? Ne ĉiam estas ĉio en ordo; ja kiel povus esti?! Okazas foje akcidento, homoj kolektiĝas, venantaj el la flankstratoj kun la grandurba paŝo, kiu nur malmulte tuŝas la pavimon; ĉiuj ja estas sciemaj, sed ankaŭ timas seniluziigon; ili spiras rapide kaj antaŭstreĉas siajn



malgrandajn kapojn. Sed se ili tuŝas unu la alian, tiam ili profunde kliniĝas kaj petas pardonon: 'Mi tre bedaŭras, - ĝi okazis senintence - la homamaso densas, pardonu mi petas - estis tre mallerte de mia flanko - mi tion koncedas. Mia nomo estas - mia nomo estas Jerome Faroche, spickomercisto mi estas, en la rue du Cabotin - permesu, ke mi invitu vin morgaŭ por tagmanĝi - ankaŭ mia edzino tiel tre ĝojus.' Tiel ili parolas, dum la strato estas tamen surdigita kaj la fumo de la kamenoj falas inter la domojn. Jen kiel stas. Kaj ĉu eblus, ke jen sur homplena bulvarado de eleganta kvartalo du veturiloj haltas. Servistoj gravmienne malfermas la pordojn. Ok noblaj sibiraj luphundoj dancetas malsupren kaj bojante hastas tra la veturejo salte. Kaj jen oni diras, ke tio estas maskitaj junaj parizaj dandoj. "

Li havis la okulojn preskaŭ fermitaj. Kiam mi silentis, li enbuŝigis ambaŭ manojn kaj tiregis ĉe la malsupra makzelo. Lia vestaĵo estis tute kotkovrita. Oni eble elfetis lin el vinejo kaj li ankoraŭ ne konsciiĝis pri tio.

Estis eble tiu malgranda, tute trankvila paŭzo inter tago kaj nokto, kie la kapo al ni, sen ke ni atendus tion, pendas en la nuko kaj kie ĉio, sen ke ni rimarkus tion, haltas, ĉar ni ne rigardas ĝin, kaj jen malaperas. Dum ni restas solaj kun kurbiĝinta korpo, poste ĉirkaŭrigardas sed nenion plu vidas, ankaŭ ne plu sentas reziston de la aero, sed interne tenas nin al la memoro, ke en certa distanco de ni staras domoj kun tegmentoj kaj bonŝance angulaj kamentuboj, tra

kiuj la mallumo fluas en la domojn, tra la subtegmentaj ĉambretoj en la diversajn ĉambrojn. Kaj estas feliĉe, ke morgaŭ estos tago, dum kiu, kiom ajn nekredible ĝi estu, oni povos ĉion vidi.

Jen la ebrulo alten tiregis siajn brovojn, tiel ke inter ili kaj la okuloj estiĝis brilo, kaj deklaris intermite: "Jen kiel stas nome - mi nome estas dormema, pro tio mi iros dormi. - Mi nome havas bofraton ĉe la Wenzelsplatz⁴ - tien mi iros, ĉar tie mi loĝas, ĉar tie mi havas mian liton. - Mi iras nun. - Mi nome nur ne scias, kiel li nomiĝas kaj kie li loĝas - ŝajnas al mi, ke mi forgesis tion - sed ne gravas, ĉar mi eĉ ne scias, ĉu entute mi havas bofraton. - Nun mi nome iras. - Ĉu vi kredas, ke mi trovos lin?"

Al tio mi diris senhezite: "Tio estas certa. Sed vi venas el fremdlando kaj via servistaro hazarde ne estas kun vi. Permesu ke mi gvidu vin."

Li ne respondis. Tiam mi etendis al li mian brakon, por ke li interligu la sian.

1. Ringplatz, en la sekvo: Ringplaco
2. Karlsgasse
3. Kleiner Ring
4. Wenzelsplatz

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/ebriulo.html>

«Patrin' mia 'stis cigaredist'»

tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Patrin' mia 'stis cigaredist',
kiel neniu kondukis ŝi,
plu mi vidas ŝian bildon
en fum' de mia blanka cigared'.

Ŝia anim' blanke pura,
honesto, modesta kaj rekta,
mian animon envolvis
kiel tabakotubo blankega.

Jam mortinta vivuleto !
Protektu cin l'amo dia,
certe iris ŝi al ĉiel' rekte
volvita en blanka mortotuko.

Patrin' mia, stelo perdita. Mi
plu ŝin vidas de inter veprej',
kvazaŭ ŝi envolvitus en la
mortotuk' de miaj okuloj.

Portugala fadoa kanto
la aŭtoro : **Filipe Pinto** (1905-
1968). Mortis ankaŭ li
«Patrin' mia 'stis cigaredist'» jen
okazo rememorigi pasintan metion
antaŭmaŝinan, profesion utilan,
veran, de homoj normalaj, ne de
arogantaj burĝoj, klasrasismaj kiel
Macron, nu veraj personoj! (kaj
utilaj, inter tiuj, kiuj, - ili! -
produktadas varojn por la aliaj
personoj, ne estrarulaj parazitaj
(kiel tiom bone diris en televido
Bernard Friot), kiuj faras nenion ol
kunvenumi.

(Kaj ankaŭ prikanti tabakon estas
nun ago rezisteca kaj libereca)

La kanto aŭskultebblas ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=Ao0ciQTTH0E>



penetraĵo de Manuel Cabral Aguado y Bejarano (1827-1891)

Fantomo de Patro Kristo Negovani

Mi neniam vin forgesis
Tial fantomon mi ree venis
Albanio, benita Patrio
Ĉe vi restas mia menso.

Kiam grekoj per tranĉilo min buĉis
Por ke nia benita lingvo ne disvastiĝu
Ili kriegis kaj miaj okuloj malheliĝis:
Aŭdinte ke "Albana ja malbenita estu"

Dum sango kiel rivero elverŝiĝis
Oni denove tranĉilon ĉe min enigis
Albana vorto ege ilin rabiigis
Tutan tempon greke ili parolis.


Mi kriegis ree pro la vundoj,
Albane mi parolis kaj ululis
Kaj mia voĉo pli kaj pli reduktiĝis
Pro turmentoj de vandaloj el Grekio.

Dum mia animo eksteren eliris
Kaj tempon por aldiri ilin mi ne havis
Ke neniam sen albanoj ekzistus
kaj Grekio tiel multe enmonde konatus

Mi pacon en Paradizo ne trovas
Kiam religiajn ritojn oni kantas
En la lingvo de miaj buĉistoj
Kaj samtempe albanlingvo neniigistoj.

Tirana, 11.08.2016

Noto: Patro Kristo Negovani, albana ortodoksa pastro, kiun grekoj mortbuĉis ĉar li deziris disvastigi la albanan lingvon en la sudajn regionojn de Albanio, restinta post la granda dispecigo de albanaj teritorioj en la jaro 1913

**Verda arbaro, vitra palaco****tradukis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio**

-- fabelo adaptita por infanoj
de **Simonas Daŭkant**as el Litovio

Estis iam tre riĉa bienposedanto, sed li ne havis infanojn. Li konstante preĝis, ke Dio donu al li filon, kiu estu helpanto en lia maljunaĝo kaj ekheredu ĉiujn liajn riĉaĵojn. Finfine la Sinjoro kompatis lin kaj donis al li filon. La knabo kreskis tre agrabla kaj afabla, kaj kiam li estis sufiĉe aĝa, la patro sendis lin en lernejon. Fininte la studojn, la fraŭlo ekdeziris servi en la armeo. La patro ne emas konsenti sed la filo ne cedas:

- Ne, paĉjo, mi soldatiĝos.

Do li faris memvole. Li servis en la armeo taŭge kaj akurate kaj li estis tre ŝatata de sia estraro. Finfine li mem ekestis ĉefoficiro.

Unufoje li kun sia taĉmento partoprenis militekzercadon. Revenante tra arbaro, la soldatoj atingis malgrandan vilaĝon kaj tie ĉe la vojo staris drinkejo. La ĉefoficiro eniris la drinkejon kaj petis por ion ajn trinki. Dum la drinkejmastro preparis al li la trinkaĵon, malrapide eniris mizera ĉifonulo kaj ekpetis:

- Bonvolu kompati min, mastro, donu ion por manĝi, ĉar mi preskaŭ mortas pro malsato.

Tamen la mastro anstataŭ peco da pano suprenverŝis la mizerulon per blasfemoj kaj kriegaaĉoj:

- Iru for, vi eĉ pasintfoje ne pagis por la ricevita

pano.

Kaptinte la mizerulon, elpuŝis lin, sed tiu ekkuŝis ĉe la sojlo kaj tie mortis.

La ĉefoficiro demandas la mastron:

- Kiom li ŝuldis al vi?

- He, dek groŝojn, - respondis tiu.

- Kaj pro tia eta sumo vi forprenis lian vivon.

Prenu jen dek groŝojn kiel la ŝuldon de la mizerulo kaj unu ormoneron por lia sepulto. Estu lia spirito pli feliĉa.

Doninte la monon li iris eksteren. Li rigardas, sed ne povas observi eĉ etan signon de sia armeo. Nenia viro videblas sen ia kialo de ilia pereco. Estas jam nokto kaj la ĉefo ne konas kion fari. Li pensis, longe pensis kaj decidis iri antaŭen laŭ la vojo. Apenaŭ li faris kelkajn paŝojn, li malantaŭe ekaŭdis voĉon:

- Amiko, turnu sin maldekstren kaj iru laŭ tiu vojo.

Post ioma irado vi trovos ensorĉitan bienon, kiu bezonas savadon.

Obeinte, li turnis sin kaj ekiris laŭ la indikita vojo. Post ioma irado li vere ekvidis bienon. Li eniris ĝin, sed ĝi estis tute malplena. Li trarigardis ĉiujn ĉambrojn sed nenia viva estaĵo ĉeestis. Fine en unu ĉambro li trovis tablon pretigitan por vespermanĝo kun bongustegaj manĝaĵoj kaj bonkvalitaj vinoj. La ĉefo eksidis kaj vespermanĝis. Poste en la najbara ĉambro li trovis liton, sur kiu li ekkuŝis kaj dolĉe ekdormis.



Matene li ankaŭ trovis surtabligitan matenmanĝon. Manĝinte li promenis en la ĝardeno, admiris la belegan palacon, sed li sentis iom malgaje pro la absoluta manko de homoj.

Kiam post la vespermanĝo li enlitiĝis kaj pretiĝis por dormo, subite malfermis la pordo kaj en la ĉambro eniris sinjorino, nigra kvazaŭ karbo. Ŝi rigardis al la ĉefo kaj diris:

- Kara bonfaranto! Vi venis por savi min, sed mi ne konas, ĉu vi kapablos tion. Ĉi-nokte en ĉi tiu ĉambro vin vizitos viaj gepatroj, ĉiuj viaj parencoj kaj ĉiuj deziros paroligi vin, sed vi ne parolu, ĉar ili ne estos viaj gepatroj kaj parencoj, sed transformiĝintaj diabloj. Se vi prononcos nenian vorteton, ili ne sukcesos male efiki vin. Sed se vi ekparolos, vi mem pereos kaj min pereigos.

Dirinte tion la sinjorino malaperis kaj li restis sola.

Antaŭ meznokto en la ĉambro subite aperis lia patro, patrino, onkloj, onklinoj kaj multego da aliaj parencoj. Tuj ĉiuj penis ekparoligi lin, demandis, petis kaj plej persistema estis la patro. Li konstante riproĉadis lin:

- Ve, mi edukis lin, zorgis pri li kaj nun li fanfaronas kaj eĉ unu vorton li ne diras al sia patro!

Dum ilia bruado kaj babilado koko ekkriis kaj ĉio malaperis. La ĉefoficiro enlitiĝis kaj trankvile ekdormis. Vekiĝinte matene li lavis sin, matenmanĝis kaj poste promenadis sur la bona tereno. Post la vespermanĝo li enlitiĝis kun la pensoj pri la okazontaĵoj de ĉi-nokto. Baldaŭ reaperis la nigra sinjorino, sed li observis, ke ŝi jam ne estas tiel intense nigra, sed pli blankema. La sinjorino ekparolis:

- Bonfaranto! Vi eltenis la pasintan nokton, do ankaŭ penu elteni ankaŭ ĉi-tiun, kiu estos pli malfacila ol la unua. Tuj venos viaj soldatoj, kies estro vi estas. Ĉiuj salutos vin, paroligos kaj deziros ekaŭdi eĉ unu vian vorteton. Sed vi respondu al neniuj kvazaŭ vi estus ne aŭdinta ilin.

Dirinte tion ŝi tuj malaperis.

Antaŭ meznokto svarmis la plenplena ĉambro per soldatoj kaj oficiroj, kiuj ekatakis lin, ke li ekparolu. Kiam li silentis, ili ekblasfemis kaj ekminacis lin, intencante dispecigi lin per sabroj. Tamen li nenion diris kaj la diabloj transformiĝintaj al soldatoj nenion povis fari. Kun la kokokrio ĉiuj malaperis, kaj li ekdormis kaj dormis ĝis la mateno.

Vespere, kiam li pretiĝis por la noktodormo, en la ĉambro ree aperis la nigra sinjorino. Ŝi estis preskaŭ tute blanka, nur ŝiaj manoj kaj piedoj estis nigraj.

- Dankon al vi, bonfaranto, pro tio, ke vi eltenis ankaŭ la pasintan nokton. Eltenu ankaŭ ĉi-nokton kaj ni ambaŭ estos feliĉaj. La nokto estos malfacila, ĉar vin vizitos viaj eksestroj: koloneloj kaj generaloj. Ili

donos ordonojn al vi, kriegos, sed vi ne respondu. Forlasante la ĉambron ili ekhakos vin per sabroj, sed mi donos al vi boteleton de viva akvo, trikinte kiun, vi ne sentos doloron kaj viaj vundoj tuj saniĝos.

Ŝi donis al li la boteleton kaj malaperis.

Baldaŭ en la ĉambro kunkuregis koloneloj kaj generaloj, kriegante, ke li estas perfidulo, postrestinta siajn soldatojn al kruela destino kaj ke li loĝas kaŝinte sin en la bieno. Ili opinie li estas juĝenda kaj pendigenda.

La diabloj transformiĝintaj en oficirojn ege furioziĝis kaj ŝvingis ĉirkaŭ lia kapo per seningaj glavoj. La ĉefoficiro jam opiniis, ke tiunokte li ne sukcesos resti viva, tamen ekkriis la koko kaj la oficiroj elkuregis eksteren. Preterkurante unu generalo pikis perglave en lian koron, sed trafis nur la ŝultron. La ĉefoficiro svenis pro doloro, sed rekonsciiĝinte li tuj trinkis la akvon el la boteleto kaj ree ekestis sana kaj vigla.

Vekiĝinte li malfermis la okulojn kaj ekvidis starantan en la ĉambro belan reĝidininon, kiu malalte klinis sin antaŭ li.

- Dankon al vi, bonfaranto, ke vi neektimis la malbonajn spiritojn, kaj ke vi malsorĉis la bienon. Tamen mi ne estas tute liberigita de ilia perforto. Mi esperas, ke vi daŭre helpos min. Nun vi devas iri okcidenten tra la tuta arbaro ĝis kiam vi atingos urbeton, kie loĝas mia onklino. Malantaŭ la urbo estas granda monto, do vi tie atendu min. Kiel atingi la monton, vi ekkonos el mia onklino.

Li obeis la belan reĝidininon kaj ekveturis. Trairinte la arbaron li trovis urbon kaj venis al la onklino de la reĝidino por informiĝi kie estas la monto. La onklino donis al li fraŭleton gvidanton kaj metis en ties poŝon ruĝan pomon.

- Kiam la ĉefoficiro ekdeziros trinki, donu al li ĉi-tiun pomon, - flustris ŝi en lian oreilon.

Venis ili al ĉi-tiu monto kaj la oficiro tiel ekdeziris trinki, ke li tute ne povis suferi.:

Tiam la fraŭlo diras:

- Mia panjo donis al mi pomon kaj petis doni ĝin al vi, kiam vi ekdeziros trinki.

Kaj li donis al li la ruĝflankan pomon.

Manĝinte la pomon la ĉefoficiro sentis tian fortan dormemon kaj liaj okuloj tuj firmege kovriĝis. Li kuŝis kaj firme ekdormis. Post ia tempo alveturis la reĝidino. Ĉiel ŝi vekis lin sed neniel sukcesis. Tiam ŝi diras:

- Mi alveturos morgaŭ, li atendu min.

La kaleŝo, la ĉevaloj kaj la veturigistoj malaperis.

Tuj post kiam la reĝidino forveturis, la ĉefoficiro vekis.

- Ĉu la reĝidino estis alveturinta? - li demandas.

- Certe, - respondis la fraŭleto. - Ni vekis vin,

vekis, sed neniel sukcesis. Ŝi promesis morgaŭ alveturi.

Iris ili al la onklino por tranoktado kaj matene revenis sur la monton. Sed ankaŭ ĉi-foje ĉio okazis same kiel la unuan fojon: la ĉefoficiro ekdeziris trinki, la fraŭleto donis al li la ruĝan pomon kaj ekdormis kvazŭ mortinta. La reĝidino ree ne sukcesis veki lin kaj kun sopiro forveturis, dirinte, ke ŝi alveturos sekvontan nokton.

Sed ankaŭ la trian nokton la ĉefoficiro manĝis la ruĝan pomon kaj ree ekdormis. Kiam la alveturinta reĝidino ne povis veki lin, ŝi ekploris kaj ekplendis pri sia sorto. Tiam ŝi tranĉis sian fingron, elingigis lian sabron kaj skribis sur ĝi per sango: „Karulo, vi trovos min kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco. Kial vi preterdormis sian feliĉon?“

Kiam la reĝidino forveturis, vekigis la ĉefoficiro kaj demandas:

- Ĉu la reĝidino estis alveturinta?
- Jes, sed ne vekinte vin ŝi refoje forveturis.

La ĉefoficiro ekploris:

- Ĉu ŝi nenion restigis al mi?
- Restigis. Jen ŝi ion skribis sur via sabro.

Li rgardas kaj vidas surskribon: „Karulo, vi trovos min kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco. Kial vi preterdormis sian feliĉon?“

- Diru al mi, kio kaŭzis mian dormemon. Ĉu vere vi ne scias, kio okazis kun mi?

- Mi scias, - respondis la fraŭleto. – Mia patrino estas sorĉistino kaj verŝajne ŝi ensorĉis vin per la ruĝaj pomoj.

Ploris kaj sopiris la ĉefoficiro kaj ekiris li en la vastan mondon por serĉi la verdan arbaron kaj vitran palacon. Iris, li iris kaj ian tagon ekvidis ĉevoje tri malgrandajn luktantajn viretojn. Li haltis kaj demandas ilin:

- Pro kio vi luktas?
- Nia patro postmorte restigis al ni valorajn aĵojn, do ni luktas pro ili.
- Kaj kiaj estas la aĵoj?
- Jen ili estas: selo, mantelo kaj vipo.
- He, veraj bagatelaĵoj, - ekridis la ĉefoficiro.- Ili estas ja tute nevaloraj.

-He, vi nenion konas,- ekkriis la viretoj.- Ĉi tiuj objektoj estas miraklaj. Se vi sidiĝos sur la selo, vi povos flugi kien vi volas. Vestinte sin per la mantelo vi ekiĝos nevidebla, kaj se vi klakos per la vipo, iaj- ajn muroj ruiniĝos.

La ĉefoficiro pensas, ke ĉi tiuj aĵoj ankaŭ taugus por li, do li diras:

- Sed kial vi laktu? Ja vi estas trio kaj ankaŭ la aĵoj estas tri.

- Ja, ĉiu eln ni volas posedi ĉiujn aĵojn. Estus bone, ke vi eksolvus nian konteston.

- Bone, - respondis la ĉefoficiro kaj montris permane apude starantan kverkon. – Kiu estos la unua alkurinto al la kverko, ricevos ĉiujn aĵojn.

La viretoj ekkuris, kaj la ĉefoficiro sidiĝis sur laselo, vestiĝis per la mantelo, prenis la vipon kaj malaperis el liaj okuloj. Vane vi provus ekvidi lin.

Sidas la ĉefo sur la selo kaj flugas inter la nuboj. Rigardis li malsupren kaj en arbustaro ekvidis malgrandan dometon. Li alteriĝis, venis en la dometon kaj demandas:

- Ĉu estas iu-ajn ĉi-tie?
- Estas!- respondis aperinta el malantaŭ la forno griza maljunuleto.
- Diru, bona homo, eble vi konas, kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco.

- Kvankam mi estas la reĝo de bestoj, tion mi ne scias. Sed mi demandas miajn bestojn.

Kunvokis li ĉiujn bestojn kaj demandas, tamen ili nur balancas siajn kapojn. Nenion ili scias.

- Kara gasto, vi vidas, ke mi ne povas helpi vin, ĉar miaj bestoj tion ne konas. Flugu al mia frato, eble, li konas.

Nenio estas farenda, flugas li daŭre. Atingis li alian dometon kaj iras en ĝin. Tie renkontas li eĉ pli aĝan maljunulon, kiu agnoskas sin reĝo de fiŝoj.

- Ĉu vi ne konas, maljunulo, kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco?

- Mi mem ne konas, tamen eble miaj fiŝoj konas.

Kunvokis li ĉiujn fiŝojn el riveroj, lagoj kaj maroj kaj demandas, ĉu ili konas tiun lokon. Sed ankaŭ ili ne konis.

- Flugu, kara gasto, al alia nia frato, reĝo de birdoj. Eble li konos.

La ĉefoficiro faris laŭ lia konsilo. Li trovis la trian dometon, kie loĝis griz-griza, old-olda reĝo de birdoj.

- Ne, mi ne konas, - diras li al la gasto,- kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco, tamen eble miaj birdoj konos.

Kunvokis li ĉiujn birdojn, sed ankaŭ ili nenion sciis. Subite la maljunulo rimarkis, ke forestas la maljuna korvo, vivinta en ĉi-mondo jam kvincent jarojn.


- Invitu lin,- li diris, - Li certe scios.

Baldaŭ la nigra korvo flgis al la reĝo.

- Mi konas, kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco sed ili estas tre malproksime. Ni vojaĝus tien multajn jarojn. Krome la arbaro estas ĉirkaŭita per alta ŝtona muro, neascendebla kaj netraflugebla. Malantaŭ la muro la vitra palaco estas gardata per multnombra gardantaro kaj neniu estas permesata la palacon eniri.

- Tio estas malgrava obstaklo, - respondis la

>>12



Ljev Tolstoj (1828 - 1910)

Tri paŝtejoj kovritaj de herbaĵo je sama denseco kaj sama kreskeco sur ili havas la jenajn surfacojn: $3\frac{1}{3}$, 10 kaj 24 akroj (1 akro estas proksimume 0.405 ha).

La unua paŝtejo nutrigas 12 bovinojn dum kvar semajnoj; la dua 21 bovinojn dum naŭ semajnoj. Kiom da bovinoj povas nutri la tria paŝtejo dum 18 semajnoj?

Solvo

Ni enmetu helpan nekonatan grandon y kiu notas la inican rezervon de la herbaĵo sur unu akro kreskanta je rapideco unu akro dum unu semajno.

En la unua paŝtejo la herbaĵo kreskiĝos je $3\frac{1}{3}y$ kaj dum kvar semajnoj estiĝos $3\frac{1}{3}y \cdot 4 = 40/3y$ y de la inica kvanto de la herbaĵo.

Ĉar y estas la kreskiĝo de la herbaĵo je 1 akro por 1 semajno, tiam la ĝenerala kvanto de la kreskiĝo de la herbaĵo je akroj estos (tiu dekomenca plus aldonon) $3\frac{1}{3} + 40/3y$

Tio signifas ke 12 bovinoj dum 4 semajnoj formanĝas la herbaĵon sur surfaco $3\frac{1}{3} + 40/3y$ kaj 1 bovino dum 1 semajno formanĝas $1/48$ aŭ $(10 + 40y) / 144$

akroj.

Per similaj elkalkuladoj por la dua paŝtejo ni havas:

Dum 1 semajno la kreskiĝo de la herbaĵo por unu akro estas y

Por 9 semajnoj tio estos 9y

Por 9 semajnoj en 10 akroj estos 90 y.

La rezervo de la herbaĵo sur la dua paŝtejo kaj ties kresko dum 9 semajnoj egalas al la kvanto de la herbaĵo sur surfaco $10 + 90y$ akroj (konvertita alsurfacoj). Ĉi herbaĵon formanĝos 21 bovinoj dum 9 semajnoj.

Unu bovino dum unu semajno formanĝas $(10 + 90y) / (9 \cdot 21) = (10 + 90y) / 189$ akroj da paŝtejo.

Ĉar la konsumado de la herbaĵo de ĉiuj bovinoj supoziga samkvanta, tiam la lasta nombro devas egaliĝi al tiu akirita por la unua paŝtejo.

$(10 + 40y) / 144 = (10 + 90y) / 189$

De kie y = 1/12

Sciante y, ni povas difini la surfacon de la paŝtejo, la efektivan rezervon de la herbaĵo nutriganta unu bovinon dum 1 semajno, t. e. ni eltrovas la numeran valoron de

$(10 + 40y) / 144$ per 1/12 rezultanta $5/54$ akroj

La tria paŝtejo el 24 akroj nutrigas x bovinojn dum 18 semajnoj.

Tiucele bezonatas $5 \cdot 18 \cdot x / 54 = 5/3 \cdot x$ akroj da paŝtejo.

La kresko de la herbaĵo egalas al la rezervo el $24 \cdot 18 \cdot 1/12 = 36$ akroj.

La tuta herbaĵo dum 18 semajnoj egalas al la rezervo de herbaĵo de $24 + 36 = 60$ akroj.

$5/3 \cdot x = 60$ de kie x = 36 bovinoj



26>> 1952.

Anna Fazekas mortis la 2-an de januaro en 1973. (Laŭ indikoj de Google-informoj de scienca kunlaborantino sinjorino Ilona Böde)

Mátracered estis hungara vilaĝo ĉe montaro Mátra. Dum la timoplana, animpremaj jaroj de la dua mondmilito, tie la tiama juna pedagogo somerumigis kvindek infanojn. Malgranda paca insulo estis ĉi tiu tendaro dum tiuj jaroj.

Multoj: infanoj kaj plenkreskuloj vizitis ĝin, ĉar la juna Anna Fazekas kreis tian etoson, ke ĉiuj estis ĝojaj en sia proksimeco. Al pliaĝuloj ŝi donis utilajn konsilojn, kun la infanoj ŝi ekskursis, animalojn nutris kaj po vesperoj ŝi kantis belegajn popolkantojn el

kolektoj de Adalberto Bartók kaj Zoltán Kodály, kune kun la vilaĝaj infanoj.

Post la dua mondmilito Anna Fazekas foje rememoris al sia infantendaro en sia ŝatata montaro Mátra. Tiel naskiĝis la fabeloj: Kapreoleto de Olda Onjo – Kapreolavinjo.

Ĉi tiu, nun aperanta esperantolingva eldono – pere de la Hungara Elektra Biblioteko – estas ĝia unua esperant-lingva traduko.

Ni dankas la konsenton, permeson de sinjorino Eva Gerő, posteulino de la verkistino Anna Fazekas, pro la esperantolingva aperigebleco.

Sinjorino Adri Pásztor kaj D-ro Endre Dudich

Laŭ la Astrologio|astrologiistoj la naskiĝintoj de cxiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la "« kaprokornaj »"



Kiel li reagas ?

La kaprokornulo nakiĝis frustrita. Kiom ajn oni donas al li, li ĉiam sentos "mankon". Li bezonas atenton, tenerecon, afablecon ; li ne eltenas esti forpuŝita kaj eĉ malpli esti forlasita. Estas en li abisma avido, kaj devos lernadi je akiri iaspecan malligitecon, serenecon – je kio li fakte sopiras – kiu ne iĝus – malfacilas ! – rezignacion nek bedaŭron, nek universalan malesperon.

Li ŝajnas trankvila, ĉar li multe sinregas, time de aliulaj reagoj, li subpremos siajn plej krudajn kolerajn. Li ĉiam emas lasi amasiĝi la plendomotivoj kaj malpardonoj – kiujn li neniam forgesas – sed la tagon, kiam okazas eksplodo, ne estas « la pokalo kiu superpleniĝas », sed cisterno ! Kaj lia ĉeularo kutimiĝintaj vidi lin senemocia, surprizegas.

Do li ĝenerale iĝas amara, aŭ malespera.

Li ofte serĉas posedon, monon, ĉar tio liveras al li sekurecon kiun li bezonas. Simile li ne malemas, ke aliuloj eraras pri li kaj timas lin, ĉar li frue en la vivo komprenis, ke kiam li akiris povon super la aliaj, tiuj havas malpli da super li ! Cetere iom « reĝi la ĉeanon mondon » ne malplaĉas al li.

Sia dignosento, aŭ ĉu tromemsento ? Malhelpas lin ofte peti pri helpo, konfesi siajn malfortajn momentojn, malkontesti siajn malkuraĝaĵojn. Li ofte konsentas konciencocedojn, pro timo je kontraŭpuŝiĝoj. Kaj tiujn ili riproĉos al si longtempe kaj dolore.

Li ŝatas komunikon sed ankaŭ bezonas, kaj ŝatas, silenton kaj solecon.

Ŝato al vojagoj, sed korigiĝas al la nasklando.

Je kio li taŭgas ?

Li povas meti sian analizeman inteligentecon en la servon de sciencaj laboroj, filozofiaj studoj,

arĥeologiaj esploroj ; La estinteco, la fora estinteco, malnovaj ŝtonoj, antikvaj lingvoj, ktp ĉio tia fascinas lin, pli ol la nuntempo kaj multe pli eĉ ol la estonto. Al li plaĉas malkovri la kaŭzojn de la meĥanismoj, la kialojn de la fenomenoj, iris ĝisfunde de la temo, elradiki ties esencon. Ankaŭ la misteroj, la transnormala, la mistiko logas lin, kvankam malfidan kaj skeptikan.

Li malŝategas esti « taŭzita », persekutita ; vundita de l'kritikoj, malindiferenta je l'laŭdoj, vivo al li estas konstanta ulcero. Kaj li konstruas al si sian kirasŝelon tiel, kiel li kapablas.

Ankaŭ multaj politikulojn oni trovas en tiu signo : ŝato al povo kaj ago, laboro kaj respondecoj, ĉefe bezono esti utila.

Oni povas kalkuli je li, ĉar li estas tre parolfida ; sed li neniam fanfaronas je promesoj, kaj li bezonas tempon. Cetere en ĉiaj kampoj li bezonas tempon, lia sukcesiĝo estas ofte malfrua ; La kaprikornulo ofte plijuniĝas kun la jaroj, kaj adaptiĝas al modernismo pli bone dum sia maljuneco.

Ofte li montras petolulan flankon, kiam li sentas sin « en fido ».

Kiel li amas ?

La kaprokornulo estas malfida, singarda ; Li timas suferi, kaj esti forlasita ; do li aliras amon sur piedpintoj, kun suspektema animo kaj oftege aspekto malĉarma. Ĉar li cetere estas moralisto, li aspektas al aliuloj kvazaŭ li juĝas ilin. Tio ne estas tute vera ... sed jes li rapide ekvidas iliajn tiklajn punktojn.

Ĉio ĉi ofte instaligas lin en daŭra fraŭleco. Li cetere des pli malemas « elpaŝi », ke li estas fidelulo, kaj malŝatas ŝanĝon. Li scias, ke kiam li estos dirinta « jes » li ne retropaŝos, eĉ se li deziros tion fari, aŭ ke se li tion tamen faras, estos post montaroj da streboj kaj sufero. Krome kaj krone li ŝatas solidecon. Al li plaĉas la kutimoj, ili estas trankviligantaj.


Al li estas ofte malfacilega esprimi siajn sentojn. La alia devas nur memori ke ĝi estas amita. Sed li, male, bezonegas korvarmon!

Pli precize estas du specoj da kaprokornaj, unu pretermensa – kiu trebone vivas en sia fraŭleco – kaj alia, kiu donadas, kaj petadas tenerecon, kiu post kiam siaj defenciloj estos falintaj, efektiviĝos senlime amema, prizorga kaj ĉeesta, ĉiam kun iom da korpudoro. (ne da sekspudoro !).

Li estas la ideala edzo de la malfruaj unuiĝoj.



Sinjoro Klaus-Dieter Loetzke (KDL) estis membro en la "rondo skribantaj laboristoj". Poste li iĝis kandidato kaj finfine dezirata membro en verkista organizo en la GDR. (Germana Demokratia Respubliko).



La skribantoj kaj pentrantoj estis ĉiuj en la rondo de la klubdomo en Ĉornevico (Zschornewitz). Ili komune ellaboris dum tiu tempo broŝuron pri "ĈE LA LARĜA KRUTA STRATO".

La broŝuro enhavis tekstojn kaj plumdesegnaĵojn.

Mia kontribuo konsistis el portreto de unu laboristo. Kiam KDL sian tekston recitis, mi sentis ke li sonis saĝe kaj lia voĉo agrable. Mi rigardis lin kun intereso. Liaj plenaj belaj ondoformaj mezblondaj haroj kaj la supra lipharbarbo, la okuloj kaj lia trankvila voĉo impresis min.

Kiam mi estis en mia urba biblioteko dum deprenado de miaj bildoj de jam finita ekspozicio, ni renkontis hazarde la duan fojon.

Li ofertis al mi tuj sian helpon kaj li portis kun mi la grandajn vitrajn kadrojn en formato 60x80 cm al kontraŭe troviĝanta tiama ateliero en la Schlosstraße 7 (Kastelostrato). La "urbo" ofertis al mi, ĉe la iama loĝeja mizero, permesi "loĝeblecon en neloĝebla loĝejo" kiel ateliero en deŝira-domo. La malnova ligna ŝtuparo aspektis krute, mallarĝe kaj plene de puloj de la korta hundo Ŝtupsi.

La 1 1/2 ĉambra loĝejo plus kuirejo kun fornelo estis mia ateliero, mia feliĉo kiel kontraŭo de ĵus ricevita novkonstruita loĝejo en la ĝardenostrato (Gartenstraße).

La puloj, kiuj saltis el la plankaj fendoj dispikis miajn kruojn. Mi devis kontraŭbatali. Ĉio aspektis kiel idilio en bildo de Carl Spitzweg. (Karl Ŝpicveg) "La malriĉa poeto" kun "kanonforno" kaj simile pluvis sur mian grafikŝrankon, kaj vidiĝis poste bruna argila saŭco sur kelkaj grafikaĵoj. Hodiaŭ mi povas amare ridante raporti pri la afero.

KDL iĝis adoranto de miaj bildoj kaj mi de liaj mallongaj noveloj. Li donacis al mi siajn unuajn publikaĵojn, plene principe plej ofte serene li verkis en prozo "Simpel, Schorsch und

Schweinemeier" ("Simpel, Ŝorŝ kaj Porkolumbo") kaj poste la libreton "Iru hejmen, anĝelo!". Li estis koresponda studento en la instituto pri literaturo "Johannes R. Becher" en Lepsiko (Leipzig).



Kun sia amiko li decidis ne plu fordrinki sian penskapablon, kiun li nepre bezonis por plua studado.

Origina alkoholisto estas daŭra drinkulo, ĝis al la fino, ĝis la deziro mortigi sin. Sed li sukcesis, kiel kutime nur 2% el ĉiuj alkoholistoj, per forta volo atingi la celon, ke li neniam plu drinkadis alkoholon. Ĉokoladon kun alkoholon ene li malakceptis. Li povis spekti, se aliaj trinkis bieron kaj brandon.

Sed li ruinigis sin fumante. Tio malplaĉis al mi. Li donis al mi slipeton sur kiun li skribis:

*Wenn Du es wahrmachst, dass Du zu mir kommst,
höre ich auf zu rauchen.*

Ort, Datum, Unterschrift.

("Ekde 1.9.1982 mi ne plu fumos. Tiellonge ne, kiam mi scias, ke Helga amas min - nur min. Loko, subskribo").

Mi ne petis lin pri tiu skribaĵo, sed mi konservis ĝin.

Mi konfidis lin kaj ni komencis en unu reciprokan artisman inspirantan tempon. Ĝi daŭris ses jarojn kun maksimuma altitudo, sed ankaŭ kun malaltitudo.

Post tri vanaj provoj per maksimume nikotinliberaj dek tagoj per bonbonsuĉumado, sukotrinkadoi kaj multa promenado, li rezignis. Li levis seĝon kaj kriis: "Mi disbatos ĉion!"

Mi reagis tute trankvile: "Tio tute ne impresas min! Metu suben la seĝon", mi postulis.

Li rigardis min surprizite kaj singarde li remetis la seĝon. Li petis min trankvile, sed determinite, aĉeti por li skatolon da cigaredoj en la gastejo ĉe la foiro-placo. Por preventi ekstremon, mi plenumis lian peton sen diskutado.

Kutime li aĉetis cigaredojn "Salem" ne nur skatolete sed stangaplene. Dum li sidis, liaj kruoj regule movis sin. Tipe por fortaj fumantoj. Ankaŭ manko de respekto kontraŭ sin mem kaj aliajn ĉeestantojn estis tipe por fumantoj. La forta fumo kaŭzis naŭzon kaj vomemon, ĝi donis al mi spirinfekcion. Mi ricevis tusataĵojn kaj eĉ korataĵojn. Kiel infano mi havis jam tiajn problemojn, se mia patro fumis pipon, kaj mia patrino tuis malsane ĝis dum tusado videblis sango el la pulmo en naztuko. La kuracisto malpermesis al mia patro fumi en nia loĝejo.

Sed li fumis en koridoro ĉe la fenestro. Kiam mi venis el la lernejo, mi tamen spiris tiun fumvaporon kaj mi tuis kaj malŝatis ĝin.

Se ankoraŭ aliaj fumantaj amikoj vizitis KDL, tiam la blua vaporaĵo okazis plej forte! Aliakaze interesis min la manuskriptlegado kaj diskutado en tiu amika rondo, ofte mi skizis dum tiu afero.

KDL donis al mi preferinte min, sian manuskripton kaj tiel nomatan "literaturan flagon".

Li tre ŝatis mian opinion kaj akceptis per ĝojo malgrandajn ŝanĝproponojn. Mi komencis mian ankoraŭ netaŭgan skribprovon per mallongaj rakontoj. KDL komencis pentri bildetojn per olea farbo kaj linoleumajn artaĵojn. Komencinte per strekaj figuroj, tiuj montris afiŝojn sur kiuj legeblis: "Biero! Brando!" Kaj unu haltis: "Kafo!". Tiu li mem estis.

Li ekproduktis vicon da satiraj linoleumaj-artaĵoj, kiujn li impertinente derivis el proverboj. Ni havis ĝojon ilin presigi kaj disdonaci. Ni laboris intensive tra tutaj noktoj. Ni nutris nin per forta kafo, frititaj terpomoj kaj "mortita avino", kio estas "griaĵa sanga kolbaso". Ni manĝis terpoman supon kun "hakitaj viandopilketoj" kaj konservitajn fungojn el konserv-glasoj kun terpomoj.

Mi havis interesajn taskojn por pentrado kaj per tio monon por pluvivi. Ankaŭ KDL gajnis monon per skribado. Humorplene li diris al mi: "Hodiaŭ vi havas liberan deziron!"

Modeste mi respondis: "Mi deziras pentri vin per olea farbo." Mi tuj sciis, ke li ne duonan horon kapablus trankvile sidi. Li postulis de mi, ke mi iru en la apotekon por havigi "TABEX" antinikotinpilolojn. Li ankaŭ prenis tiujn dum la portreta modela sidado. Dum tiu tempo de la pentrado estis la problemo per TABEX (TABEKS) solvita.

Mi pentris sur jam antaŭ preparitan malmolan lignaĵan platon en la formato 30x40 cm. KDL vestis sin per griza ĉemizo, restaĵo el lia tempo ĉe la gardostaranta grupo.

Amplene mi pentris lian mezblondan ondoplenan hararon kaj liajn volbitan lipharbarbon kaj liajn seriozajn blugrizajn-helbrunajn-verdamiksitaĵojn okulojn. La pala flaveta haŭtkoloro permesas elsentii la fumanton. Tamen: El la preta bildo briladis finfine lia personeco.

Pri tio ni ambaŭ estis fieraj kaj ni havis saman opinion.

Lian trankvilan seriozecon mi sentis agrable. Li ne parolis multe, sed kion li diris, tio havis profundecon. En la geamika rondo oni ŝatis lin. Li montris sin

kiel fidinda helpema amiko. Ĉiun monaton ni renkontiĝis ĉiam ĉe alia amiko por legi manuskriptojn. Se KDL voĉlegis, mi ricevis kelkfoje la eblecon por improvizita "lavŝnurekspozicio". Mi povis raporti en tiu kultura rondo pri mia laboro kiel pentristino kaj pri miaj internaciaj portretoj kiujn mi kiel esperantistino ĉe multaj esperantorenkontoj desegnis.

Ĉe la literaturista voĉlegado kaj en amika rondo mi sentis mense konvene, postulte, subtenite kaj agnoskate. La portreto pri KDL estas atesto el tiu frukta, produktiva periodo.

Postvorto:

Post ses jaroj de komuna vivo "liberigis" min KDL bonvole kun la vortoj: "Ĉe mi vi mizeriĝos! Mi ne sukcesos ĉesigi mian fumadon! Serĉu al vi alian viron, nepre nefumanton!"

Tiu forsalto kaj ŝanĝo al mi sukcesis en la 3-an de Julio 1988 en Dresdeno. Sed tiu estas alia rakonto, ligita kun aliaj bildoj.

KDL forpasis bedaŭrinde mallonge post la komenco de sia pensiuliĝo, nokte tra korinfarkto. Lia patrino trovis lin matene jam mortinta en la lito.

Kvankam ni ne plu estis kune, kortuŝis min profunde la donita sciigo. Dum tiuj tagoj mi kuŝis ĵus kelkajn semajnojn en malsanulejo, tiel ke mi ne povis partopreni lian entombigon.

La olean bildon mi ekspoziciis. Amikino estis aparte kortuŝita pro tiu portreto! Por mia nuna edzo ne estas tiu bildo lia sekvanto, sed li akceptas laŭ sia opinio la bildon kiel bonan portretpentraĵon.

sendis **Helga Plötner**, portretistino el Germanio

Ora Ĵurnalo el Svedio gratulas Turka Stelon



La **Turka Stelo** nun prezentas sian 60:an numeron, kio signifas ke la gazeto celebras sian kvinjaran ekzistadon.

Gratulon! diras Ora Ĵurnalo (nur trijara).

La redaktoron Vasil Kadifeli vi povas trovi per: [vasilkadifeli\(ĉe\)gmail.com](mailto:vasilkadifeli(ĉe)gmail.com). Li bonvenigas kontribuojn el multaj landoj.

Ĉiun monaton la retgazeto havas 32 plenplenajn paĝojn de interesa legado. /Siv

Nia familio estis muzikamanta. Enirante nian domon, oni vidis gitaron, violonon, tambureton kaj saksafonon, pendantaj sur la muro. Ekzemple mia patro estis gitaristo, mia patrino violonisto, alia frato ludis la saksafonon. Mi ludis la tambureton. De tempo al tempo, malfrue vespere, ni unuiĝis por ludi muzik-pecojn. Tiam nia domo ŝajnis gaja Oper-dometo.

Rilate tion, mi ne deziras forgesi, ke preskaŭ ĉiumonate ni kune iris aŭskulti Operon aŭ muzik-pecojn ĉe la urba Teatro. Kia etoso! Eĉ rigardante la enirantajn muzik-profesorojn, mi sentis specialan ĝojon. La muziko edukas la talenton, kulturigas la cerbon kaj ebrigas la koron. Tiuj bele vestitaj virinoj akompanantaj sian edzon aŭ amikon, ne malpli prezentablajn, liveris festan spektaklon ne ĉiutage ĝueblan.

Kvankam ni ne estis riĉaj, mia patrino priatentis, ke mi kaj miaj gefratoj prezentiĝu en niaj plej belaj vestoj, precipe miaj du fratinoj, iom pliaĝaj ol mi, kiuj, eĉ sen la atentemo de nia patrino, almenaŭ miaopinie, sciis prizorgi sin mem. Unu el ili ĉiam instruis al la alia: "fratino mia, ek por la Operoj, vestiĝu per la plej belaj vestaĵoj, imagu vin, kiel reĝinojn en la strato kaj en la Oper-domo mem, precipe tie, kie la virinoj ofertas al la viroj alian, duan, Operon, tra siaj vestaĵoj, tra la hararanĝon, k.t.p. Unuvorte, la Oper-sezono estis por ni speciala ĉielarko, kolorigante nian familian vivon.



Ĝelsomina.

La unuan fojon kiam mi ŝin renkontis estis meze de Oper-prezentado, kiam ŝi ludis la trombonon ĉe la lastaj orkestro-vicoj. Bela virino, alta, kun nigraj haroj pendantaj sur la ŝultrojn kaj dorson, kun la okuloj fiksataj sur la muzik-pecojn antaŭ ŝi.

Tiu vespero estis nomita: "La Aida-Vespere", kiun la oper-amantoj senpacience atendis por ĝin ĝui. Diru al mi, kiu Oper-amanto ne konas la kantojn: "Libiamo¹", "Celeste Aida²", "Gloria all'Egitto³", "O Patria Mia⁴", la triumfan marŝon, ktp. ?

Tiun vesperon la orkestro estis plenplena. La kondukisto ankoraŭ ne vidiĝis. Ĉiuj atendis lian aperon. Eĉ se oni ne amas Operojn, kiam oni lin

renkontas, oni komencas senti ian altiron al ili, almenaŭ li instigas onin ami ilin. Kaj de tio ĝis iri aŭskulti ilin, la vojo ne estas longa.

Jen nun la kondukisto foriris ridetante, svingante la bastonon; juna, alta, kun ĉiam ridetanta vizaĝo.

Li supreniris la podion, frapetis sur la pupitron antaŭ si, rigardetis la tutan orkestron kaj ek! Atenton!

La bastoneto tuj moviĝis. La unuaj notoj aŭdiĝis.

Trankvila etoso ĉe la teatro!

Nur Verdi mankis al la plenumiĝo de sia kolosa ĉefverko!

Sed ho ve, kiam la orkestro atingis la mezon de la konata "triumfa

marŝo", Ĝelsomina decidis ĉesi sonigi kaj stariĝis kriante, poste forirante kun la trombono ĉemane. Motivo? Kiu sciis?

La kondukisto ne povis malatenti la aferon, kaj ankaŭ li ĉesis konduki.

Vidante Ĝelsominan foriranta, la aŭskultantoj ekkriis.

Nu regis la lokon ĉirkaŭ kvin minutoj da silento. Ĉiu atendis kio okazos. Unu kriis: "Oni daŭrigu!"; alia: "Denove! De la komenco!"; "Ne," kriis alia, "maldaŭrigu, repagu la bilet-koston."

La kondukisto senpacience rigardis tien kaj ĉi tien, verŝajne sen scii kion fari.

Nekonata sinjorino tuj apudiĝis lin. Li kapjesis, faris signon kun sia bastoneto. La muzikistoj priatentis. Post la atentiga baston-signo, la Opero daŭrigis ĝuste je la Oper-parto, kion fuŝis Ĝelsomina, t.e. "la triumfa marŝo". Ĉiuj muzikistoj kompleksis. La Opero daŭris eĉ sen la partopreno de Ĝelsomina.

Pri Ĝelsomina mi multe aŭdis sed mi neniam ŝin renkontis. Mi tiel havis la bedaŭrindan okazon vidi ŝin ĉe la plej bela momento de mia vivo, ĉar por mi la Opero estas momento de arta harmonio kaj ĝojo. Malgraŭ la bedaŭrinda incidento, tiu vespero estis vere memoriga okazaĵo. Unika!

¹ *Ni drinku!*

² *Ĉiela.*

³ *Laŭdo al Egiptio.*

⁴ *Ho Mia Patrujo!.*



-- elĉerpajo el la romano de **Carmel Mallia**

Tio ne estas afero simpla, kiel povas ŝajni al vica sensciulo. Esti esperantisto – estas malfacila kaj komplika tasko. Verdire ankoraŭ antaŭ 130 jaroj iu Zamenhof kompilis libron por esperantistoj, sed ĝi verŝajne jam iĝis eksmoda en nia cibernetika epoko. Sed kiu nun havas tempon kaj volon legi la librojn? Des pli, ke tutan esencon eldiras „Fundamento ..“, kiu, citante Zamenhofon, klarigas, ke „esperantisto – estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanton, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga“. Tre utila penso! Sed ni ekrigardu kelkajn pliajn utilajn librojn. La SAT-vortaroj diras, ke esperantisto estas persono, kiu scias kaj uzas Esperanton. Tiu nacilingva vortaro de internaciaj vortoj klarigas, ke esperantisto estas persono, kiu scias kaj uzas Esperanton, disvastiganto de tiu lingvo.

Do, se vi decidis iĝi vera esperantisto, akceptu kelkajn miajn konsilojn, eble ili utilos al vi. Komencu ni de loĝejo.

La libroj, plej gravas la libroj, kaj ne iuj ajn. Vian librobretton devas ornamati tiuj eldonaĵoj, kiuj rapide disvendiĝas. Disŝiriĝu vi-sed akiru ilin! Precipe atentu la antikvaĵojn. Tie oni povas trovi rarajn malnovajn librojn, raraĵojn atentindajn. Bonan impreson elvokas eĉ iu ajn eldonaĵo aperinta antaŭ cent jaroj: „La unua libro“, „Fundamento de Esperanto“. „La Sankta Biblio“ ktp. Mi pensas, ke vi mem komprenas, ke el tiuj viaj libroj ne endas ion tralegi. La libroj manĝi ne petas, kuŝu ili tie! Tamen vi povos konsterni iun ajn gaston per viaj animaj trezoroj aŭ en intelekta interparolo vi interalie eldiros: – „Ho, Julio Baghy? Kompreneble, mi havas!“ „Ĉu Raymond Schwartz? Certe, li estas ĉe mi!“ „Kaj Edmond Privat? Sendube..“. Sed titolojn, kompreneble, necesas lerni parkere. Tio sukcesos malfacile, sed kion fari - klereco postulas oferojn.

Plue - kolektado. Esperantistoj kolektas multajn aĵojn. Nur vi ne bagateliĝu ĝis glumarkoj kaj similaj aĵoj. Antaŭ ĉio, tio jam eksmodiĝis. Nun oni kolektas portretojn de la Aŭtoro, librojn, flagetojn...

Neniam vi partoprenu klubajn kunvenojn kaj aliajn lokajn esperantistajn aranĝojn. Via celo estu Universalaj Kongresoj kaj aliaj internaciaj esperantistaj aranĝoj. Ili donos al vi ne elĉerpeblan provizon al parolado. Kaj memoru vi, ke ĉiam veturas vi tien kun espero (eble almenaŭ unu fojon!..), sed revenas ĉiam senreviĝa. Ion, verdire, eblas eĉ laŭdi – kongresa balo, ekskursoj...

Dum via parolado longe ne parolu vi, ĉar ofte aperas „saĝuloj“, kiuj scias eldiron „Oni parolas longe,

kiam oni havas nenion por diri“. Pro tiu kaŭzo tre gravas ĝustatempe ŝanĝi aŭskultantaron. Se vi estas studento, ne malrespektu unuakursanojn. Se al via demando pri la ŝatata verkisto ili parolos pri loka aŭtoro, vi hontigu ilin senkompate kaj ripetu, kion mi diris antaŭe pri R.Schwartz ktp. El tio sekvos duobla utilo - klare vi montros vian erudicion kaj, eble, el tiuj naivaj gejunuloj kreskos viaj postsekvantoj.

Vian intelekton respegulos viaj ŝatokupoj kaj via taksado - tion neniam forgesu. Neniam vi konfesu, ke vi enuas, ke vi oscedas, batalu kontraŭ tio ĉi ĝisfine kaj, gardu dio, al neniu konfesu, ke vi nenion komprenas kaj enuas. Tiam vi porĉiam perdiĝos. Vera esperantisto ne apartenas al si mem. En viaj vortoj kaj via konduto devas kaŝi sin subkompreno, ke via ekzistado en tiu ĉi mondo estas nur tragika eraro, ke vi multon povus, multon kapablus, sed ĉu iuj komprenos vin!...

Ĉirkaŭe abundas nur eternaj komencantoj al kiuj vi devas montri ilian malgravecon, se ili ne pensas tiel, kiel vi. Kaj tion sin estimanta esperantisto neniam permesos. Do pri nenio vi miru kaj ne cedu, ke vin preteriru lastaj novaĵoj

Tamen ĉio tio, kion mi menciis, ne estas la plej grava postulo. Nur via konduto kaj parolmaniero montros, ĉu vi estas vera esperantisto, aŭ nur eterna komencanto. Sed pri kio paroli? Al bonkondata esperantisto ne estas nekonataj temoj, vi devas ŝajnigi erudiciulon. Finfine tio ne gravas, pri kio paroli, sed – kiel paroli. Evitu vi paroli pri via laboro kaj aliaj banalaĵoj. Kaj tiujn trivialajn vortojn, kiel „Bonan tagon“, „Ĝis revido“, „Mi pardonpetas“ – forĵetu el via vortprovizo sen iu bedaŭro. Nepre vi devas elpensi ion pli originalan. Precipe vi atentu vian parolstilon.

Kaj tio – plej gravas, tion neniam forgesu! Kaj enkapigu vi, ke ĉiu sin estimanta esperantisto ĉiam pravas. Kaj vi devas plenumi vian mision: perfektigi anime, esperantigi proksimulojn kaj nenium profiton vi atendu. Vi devas diversmaniere subteni esperantistan movadon.

Memoru ĝuste tiujn konsilojn. Se vi obeos ilin, vi povos sendube registri vin en honora elito esperantista. Iliaj vicoj ankoraŭ ne abundas, sed poiomete kreskas.

Jen tion mi konsilas al vi.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio



Ŝi sidiĝis sur la benkon sub la pruno kaj etendis siajn krurojn por ripozi. Nur la florbedoj ŝi fosis, sed sentis sin laca.

– La vintro estis longa kaj mi eble tre senmoviĝis. Sed la printempo jam regas – ŝi direktis rigardon supren kaj alrigardis la branĉojn de la arbo.

– Nek pruno, nek mirabelo – daŭrigis voĉe paroli Elena. – Ĝiaj fruktoj estas pli bongustaj nematuriĝintaj ol maturiĝintaj. La Infanoj ŝatas konsumi ilin nematuriĝintaj. Kiom aĝa, estas la arbo neniu povas diri. Ĉu ĝi estas plantita aŭ memkreskinta sovaĝa ĉi tie, neniu scias – ŝi respiris kaj direktis rigardon al la malnova domo.

Ŝi trovis la arbon fruktodona kiam ŝi, estiĝinte bofilino, venis en ĉi tiun domon. Kaj kiam da jaroj pasis de tiam, probable pli ol kvardek, kaj ĝi ankoraŭ naskas. Kaj nun ĝi montris multan fruktodonon. La viroj senbranĉetigis ĝiajn branĉojn por rejunigi ĝin. Tiel ŝia edzo klarigis la multjaran vivon de la arbo.

Hodiaŭ ili venis de proksima urbeto, kie ili translokiĝis kun Stojan, ŝia edzo, antaŭ jaroj por perlabori la panon. Estis pli malfacile al ili loĝi en la vilaĝo, ĉar tiam mankis laboro por ĉiuj. Dum vivis liaj gepatroj ili venis, sed pli malofte. Ili iel sukcese plenumis sole siajn taskojn. Sed post kiam la gepatroj mortis, la zorgo pri la domo kaj la korto restis por ili. Dum la somero ili pasigis plej grandan parton de sia tempo ĉi tie. Ili semis tion kaj alion, por helpi sian vivtenon. Kaj ĝi, la tero, estis fekunda kaj dankema. Sed post kiam ŝia dommastro perdiĝis, ŝi ne plu revenis tiel ofte. Ŝia filo, Zdravko, prizorgis la bienon. De tempo al tempo li veturigis ŝin kun si. Kaj nun ŝi estis ĉi tie. Elena volis fari tion kaj alion, sed plejofte por vidi, ĉu la hirundoj denove nestis. Pli ol jardeko ili havis neston en la angulo, sub la tegmento de la malnova domo. Ili kreskigis sian idaron tie.

Kaj nun la paro de hirundoj estis ĉi tie. Ilia nesto - inĝeniera konstruado. Mirinde estas tio, kiu instruis ilin kiel fari siajn nestojn. Kiel laŭ fadeno – pinĉopreno da koteto ili metas, kaj poste pajlo por plifortigo.

Ŝi rigardis la neston. La malgrandaj kapetoj de la elkovitaj hirundoj estis jam videblaj. Ŝi provis kalkuli ilin, sed ili montris sin jen, kun la malfermitaj buŝoj, jen iliaj kapoj rapide kaŝis. Oni ne povis vidi ilian patrinon, la hirundon. Ŝi nepre iris por manĝaĵo, ĉar ne estas facile nutri grandan idaron.

- Unu, du, tri, ... Ili ree kaŝis - provante ŝi ekscii kiam ili elkovis, sed malsukcesis. "Unu, du, tri,

kvar ..." - ŝi nombris la malgrandajn kapojn, unu post la alia, kun malfermitaj beketoj, pretaj engluti la manĝaĵon, kiun alportis la hirundo. Ŝi ne povis fini la kalkulon ĉar denove ilia zorgema patrino furioze alflugis sur la neston. Dum ŝi provis kalkuli kiam ili estis denove, ili rapide kaŝis, glutante alian porcion da muŝoj. Ne multe da tempo pasis kaj jen hirundpatrino denove estis super la nesto. Ĉi-foje Elena sukcesis nombri la kapojn. Estis kvar kaj unu beketo.

"Kiel ĝi nutros tiom da gorĝoj?" Ŝi diris laŭte, sed daŭre observis la neston.

Sed kio okazas! Ŝi miris pri la agado de la patrino- hirundo. La lasta hirundeto en la linio, kio apenaŭ montris nur sian beketon ricevis nenian manĝaĵon. Ĝi restis kun buŝeto malfermita.

"Verŝajne ne sufiĉis nutraĵo por ĉiuj pro tio hirundpatrino ne plenigis la malfermitan buŝeton de la hirundeto. – Elena daŭrigis pensi voĉe. "Ĝi verŝajne estas la plej malaĝa, pro tio ĝi ne videblas el la nesto."

Sed tio, kion ŝi vidis la sekvan minuton, tre surprizis ŝin.

Per siaflugilo la hirundo energie elĵetis unu el la hirundetoj sur la teron. Ĝi estis eta, preskaŭ nuda. Ĝi falis sur la molan teron, sed post kelkaj sekundoj levis la kapon, kvazaŭ por vidi, kie ĝi estas kaj de kie ĝi venis. La hirundpatrino per siaflugilo metis la aliajn en la neston kaj ekflugis por nova manĝo. Surprizita, Elena ekstaris kaj rapide levis la falintan hirundon. La brusteto de la etulo montris, ke ĝi vivas. Ŝi haste prenis la ŝtuparon, supreniris kaj metis la tre malgrandan hirundeton inter la aliaj hirundetoj en la neston. Ŝi sidiĝis kaj ekatendis. Elena estis scivolema, kion faros la hirundpatrino. La hirundo verŝajne ne rimarkis, ke pretervole ŝi ĵetis sian idon sur la teron. Ŝi ne atendis longe. Jen la hirundpatrino denove aperis kun beko plena je bongusta manĝaĵo. Kaj ili, la hirundetoj, malferminte la bekojn, atendas. Ankaŭ kaj la tre malgrnda.

Sed kio okazas? Denove la hirundo svingis sianflugilon kaj la malgranda troviĝis surtere.

"Ĉu ĝi ne estas kukolo?" – Elena pensis kaj iris rapide kaj reprenis la birdeton. La hirundo denove forflugis.

– Ne, ĝi ne estas kukolo! Ĝi estas ŝia ido, kaj ankoraŭ spiras! – voĉe diris Elena.

Ŝi remetis la etulon en la neston. Ŝi ne atendis longe. La hirundpatrino jen venis. Ŝi komencis enmeti la nutraĵon en la beketojn kaj ankoraŭ ne

finis la tagmanĝo, la etulo estis elĵetita. Elena rapide levis la etulon kaj rapidege metis ĝin en sian antaŭtukon kaj premis al sia brusto. -"Eble la varmego povas revivigi ĝin," - ŝi ekpensis, sed skuis la kapon maltrankvile. Ŝi suspiris kaj komencis serĉi ŝovelilon por enterigi la hirundeton, por ke ĝi ne estu disŝirita de Miŝo, la kato. Ŝi maltrankviliĝis ĉar verŝajne Zdravko certe jam estis farinta sian laboron kaj vokos ŝin foriri. Sed ŝi ne faris paŝon kaj sentis ion movon en sia antaŭtuko.

- Nu, karuleto ekvivis! - ekkriis feliĉe Elena. Ŝi prenis ĝin per siaj nodhavaj manoj kaj tiris ĝin pli proksime al la lipoj kvazaŭ kisante ĝin. - La ideto de avino, mia bebo!

La hirundeto, kiu sentis la varmon de ŝia vizaĝo, malfermis malgrandan beketon. La malsato ŝajne premis ĝin.

- Panjo, kio estas tio? - demandis Zdravko, preta forveturi.

- Hirundeto.

- Kial vi prenis ĝin el la nesto?

- Ne, ĝi ne estas en la nesto, ĝi estas sur la tero. Lia patrino forĵetis ĝin.

- Kial la hirundo forĵetos ĝin?

- Nu, ĉe la bestoj, filo, la leĝo pri natura selektado funkcias. Se idoj ne estas sufiĉe fortaj kaj ili ne postvivas, iliaj gepatroj forlasas ilin. Antaŭ jaroj, la sama paro elkondukis la etulojn instrui ilin flugi. Kaj tiam la idaro same estis kvin. Sed iu etulo ne povis ekflugi, ĝi provis, sed vane. La paro provis denove kaj denove helpante ĝin, sed malforteta ne povis teni sin per siaj malfortaj flugiloj. Ili ne sufiĉe kreskis. Kaj tiam paro forlasis ĝin, forflugis kune kun la aliaj.

- Kion vi faros ĝin? Ĝi ne vivos! Per kio vi nutros ĝin? Panjo, bonvolu ne zorgu tro multe! Lasu lin sola! Venu, ni foriras!

- Mi ne povas, filo! Koro ne permesas al mi! - Elena kaŝis la etulon en sia antaŭtuko kaj ekiris al la aŭto.

"Dio, vere, kion mi faru ĝin? Mi eĉ ne scias, per kio oni nutras malgrandajn hirundojn," - ŝi konfesis, sed ekpensis ĝin al sia brusto kiel altvaloraĵon.

Kaj ŝi vere multe zorgis pri Senplumuleto, tial Elena nomis ĝin. Unue ŝi komencis nutri ĝin per paneroj. Poste Elena trovis falaron, legis ie, ke tio estas bona birda manĝo. Kaj ĝi, la etulo, estis englutanta kaj atendanta pli. Ĝi komencis surplumiĝi. Nigra, brila plumaro kovris ĝian hirundkorpeton, kaj sur la brusto, blanka, tre ornamis ĝin. Senplumuleto komencis petoli. La etulo ne sidis sur la branĉeto, kiun Elena portis, sed ĝi rapidis ekkoni la ĉambron.

Senplumuleto ankaŭ klopodis etendi siajn flugilojn. Kiam Elena unuafoje vidis ĝin, ŝi estis ekstaza.

- Ĝi ekflugos! - ŝi diris tiel gaje, kvazaŭ ŝi estos fluganta.

La tagoj pasis kaj Senplumuleto montris karakteron. Ĝi venis al ŝia tablo kiam Elena manĝis, preta piki de la panujo. Ĝi tre ĝoigis Elena-n, do etulo estis ŝia kunulino dum siaj solecaj vesperoj. Sed lasi ĝin en kaĝo en sia domo Elena eĉ ne pensis.

Iun tagon ŝi decidis meti ĝin sur la fenestran kornicon por vidi kiel ĝi reagos. Surprize por ŝi mem, ĝi ne timis. Ĝi rigardis kun scivolemo. Elena jetis al ĝi panerojn. La etulo rapide englutis ilin. Ŝi ripetis, sciante, ke tiutempe ŝiaj hirundoj venis por tagmanĝi. Ŝi atendis vidi, kiel ili akceptos Senplumuleto-n. Por ŝia plezuro, la renkonto estis amika. Kune ili ekbekis. La tagmanĝo finiĝis kaj la hirundoj forflugis. Ŝi denove enĉambrigis ĝin. Do Elena faris tion kelkajn tagojn. Kaj la Senplumuleto jam flugis de loko al loko. Ĝiaj flugiloj fortiĝis kaj la etulo flugis malpeze en la aero.

- Ĝi forflugos kun ili iun tagon, - Elena diris per malĝoja voĉo.

Kaj tiu tago ne malfruiĝis. Estis tagmanĝo kiam la birdaro aflugis por sekvanta manĝaĵo. Ili frande glutis la panerojn kune kun ŝia Senplumuleto. La tagmanĝo rapide finiĝis. La birdoj etendis siajn flugilojn kaj ekflugis kune direkte al la bluo. Kaj nur Elena, kun mano levita por adiaŭo, staris apud la fenestro. Unu larmo ruliĝis sur ŝia vizaĝo.

konkursajo de **Ivaniĉka Maĝarova** el Bulgario
pri humuro en EKRA 2020
EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus"

Valo-sine, en dometo
vivas kara avinjeto.
Bone konas ŝin la turdoj,
kapreoloj, kaj hirundoj.

Konas ŝin la arboj montaj,
la nuboj, la Matron kovraj,
la kukoloj, papilioj,
kapreolo - familioj.

Mildaj, junaj kapreoloj
ofte gastas ĉe la onjo;
ŝia karesnomo, digno
estas: Kapreol-avinjo.

Kiam venas la aŭroro,
trovas onjon en laboro;
pentras punktojn, florojn, branĉojn
sur la pladojn, glasojn, tasojn.

Vigle pentras la peniko,
flirtas kiel sovaĝbirdo.
Pentri ŝi nur tiam ĉesas,
kiam nigra nokto venas.

Sur la ĉe-ĝardena vojo
kuras infanoj kun ĝojo.
Faskojn de primol', salvio,
timiano, delfinio,

turkdianto, kampaj floroj
dumtage je ĉiuj horoj;
portas karaj knabinoj.
Dancas la kapreoletoj,

Bodri, ŝia hund' saltadas,
la katido kune dancas,
eĥas tion monto, valo,
lude, ĝis la nokto-falo.

Vintre vane ŝi atendis,
ĉar neniu sin prezentis.
Tiel pasis eĉ Kristnasko,
ne alvenis ajna gasto.

Neĝo kovris ĉiun klifon,
montopinton kaj deklivon,
fagon, kverkon; ega frosto
homojn penetris ĝis ostoj.

Leporeto kaŝe ploris,
timo en la kor'ekfloris.
Sub kovraĵo de glacio
naĝis fiŝa kompanio.

Kaŝis sin la etmustelo
en sia kavaĵ - kastelo;
la lacertoj hejme restis,
kaj la lupoj, ho, forestis.

Tute mutis la pasero,
falas, ĉion kovris neĝo;
kapreoloj nur arbuston
manĝis, ne havante guston.

Vane serĉas nun manĝaĵon,
timas ili ĉiun aĵon;
en okuloj trista plendo:
"Kiam venos la printempo?"

Arbhakistoj hejmeniris,
arbaregon jam rarigis.
Petegante vekis onjon:
"Helpu onjo kapreolon!"



"Nun miraklu, ho onjeto!
Senindulge falas neĝo,
mankas branĉo, grajno, fojno, –
estas nur glacio, Frostoj

regas sur la kampoj, valoj,
tre suferas animaloj.
Se la vintro tiel fortos,
ĉiuj bestoj malsatmortos."

Muta nokto pasas lante,
ŝi vigilas, atendante,
ne ripozas, ne hezitas:
vilaĝestraron vizitas...

"Helpu nun, vi, bravaj homoj,
mortos jam la kapreoloj!
Sed venkeblas eĉ la morto
per komuna homa forto."

Onj-okule brilas larmoj.
Jesas ĉiuj estraranoj.
Komence de Nova Jaro,
monten iras junularo.

Grenojn, ilojn ili portas,
korpe-mense ĉiuj fortas;
ĉar pretiĝas bestnutrejoj
satiĝas la sovaĝbestoj.

Poemo de **Anna Fazekas** * el Hungario

Esperantigis: **Adri Pásztor** kaj **D-ro Endre Dudich** kristnaske 2006

FELIĈAN NOVJARON !

* **Anna Fazekas** (Fazekaŝ) naskiĝis en Budapeŝto. Ŝi estas fratino de la historiisto **Elizabeta Fazekas**. Anna abiturentiĝis en Budapeŝto, poste akiris diplomon je kuracgimnastikisto. Ŝi kuracigis kaj pubertajn-, kaj plenkreskulojn. Dum la 1924-a jaro ŝi enŝaltiĝis en la laboristo-movadon, pro kio oni deportis ŝin en 1944.

Ŝiaj kelkaj poemoj aperis en „ESTI KURIR” (Vespera Kuriro), poste en la ĉemetaĵo dimanĉa de la **PESTI HÍRLAP** (Gazeto de Peŝt), kaj

ankaŭ en memstara volumo en 1949. Ŝi estis lektoro ĉe la eldonejo **ATHENAEUM**, krome inter 1952-1963 direktoro de la **JUNULARA-**, respektive de la **Eldonejo MÓRA**. Ekde 1950 aperis ŝiaj versaĵaj fabeloj por infanĝardenanoj kaj tre junaj lernejoj en memstaraj volumoj, parte en kolektaĵoj, kaj poemoj skribitaj en faldfoliojn kaj kolorigkajerojn.

Ŝi tradukis infano-poemojn por la eldonejoj **EŬROPO** kaj de **MUZIKVERKAĴOJ**, elektitajn versaĵojn kolektis el fabeloj de **Andreo Fáy**.

La Kapreoleto de olda onjo aperis unue en

>>18

(daŭrigata)

Saŭdado

La plej bela portugala vorto estas “saudade”. Kiu ne parolas portugale ne kaptas ĝian plenan signifon, ĉar ĝi estas tuta mondo de korsentoj pri foresto de la amata persono, nostalgio. En Esperanto, bona solvo estas “respiro” pri forestanta amata persono [itale “tu mi manchi”, france “tu me manques”, angle “I miss you”]

Kaj iam la instruisto pri Historio montris dokumenton kun poŝtmarkoj omaĝe eldonitaj pri la brazilaj soldatoj kiuj luktis kontraŭ siaj parencoj en Italio (fi pri militoj!). Temis pri dokumento de Instituto pri Geografio kaj Statistiko (IBGE), do oficiala. La instruisto transdonis ĝin: “zorgu ne meti la fingrojn sur la poŝtmarkoj”... kaj de benko al benko la dokumento iris. Subite iu demandis:

– Profesoro, kiu lingvo estas tiu kun supersigno sur konsonantoj?

Mi sidis en alia angulo, fulme ekstaris kaj glorie diris: “Es-pe-ran-to!”

Miaj kolegoj ekridegis, brue primokis min. Longe!

Ĝis fariĝis silento. La pastro instruisto diris:

– Gersi pravas. Tio estas Esperanto. Kaj vi pekis kontraŭ la karitato, malprave primokante vian kolegon. Do ni ekstaru kaj aplaŭdu lin manklake!

Vi konas la vorton “feliĉo”, do vi scias, kiom plena estis mia koro.

Pres-ti-di-gi-ta-to-ro ! uf !

Pli simpla vorto: magiisto, iluzionisto k.a. En la urbon venis tia homo, hispano, kaj bonfarante al la seminarianoj li faris specialan prezenton, dum kiu li multe babilis.

– Vi ne divenas, kial mi estas babilema? Ĉar mi parolas kelkajn lingvojn. Ekzemple, mi diros numerojn kaj vi diros en kiu lingvo:

– “Einz” [ajnc] ... pluraj kriis “germane!”, “dos”... hispane! ... “TRI”... kaj entuziasme laŭte multaj diris “angle!”.

– Kio? Ĉu vi ne scias eĉ la numerojn en la angla? Mi ne diris “three”, atentu, mi diris “tri”, kaj tio estas arbo, kaj “três” en Es-pe-ran-to!

Mi sidis en la unua vico, ekstaris kaj plengorĝe laŭtis: “Sa-lu-ton!!!”

Bedaŭre, estis tiel emocie, ke mi ne memoras kion diris la magiisto, jes, en Esperanto.

Kia venko!!! Internacia! De hispana pres-ti-di-gi-ta-to-ro!!! Tri, estas “três” en Esperanto, ne angle! – vi, stultuloj!

Esperanto parolata

Ne plu revenis la magiisto, sed vizitis nin malnova, kaputa kamiono. Ĝi staris en la korto, mi ne trovis la ŝoforon. Kaj en la vosto de la kamionaĉo pendis ŝildo: “Esperanto parolata”.



Miaj kolegoj ekridegis kaj primokis min: “Esperanto para a lata” (= Esperanto por la lado, ladskatolo... vorto kun neamika kromsignifo). Vane mi klarigis al ili... ke tio estas “Oni parolas Esperanton”... Tamen ja estis plia pruvo, ke la lingvo estas “parolata”.

La aŭtoro ne aperas en la teatro

Sabate posttagmeze, purigado finita, kelkaj kutimis sidi antaŭ granda sonaparato, kun radioricevilo potenca kiu parolis plurajn lingvojn. Kaj ni kutimis “diveni” la nomon de la lingvoj. Ankaŭ mi partoprenis en la divenado. Subite: “La aŭtoro ne aperas en la teatro.”... Mi ekkriis: “Esperanto! Mi komprenas...” Kaj mi plu tradukis kelkajn frazojn. Mia unua aŭskultita frazo el fora loko. Jarojn poste mi konstatis, ke tio estis radio el Rio de Janeiro.

Disreviĝoj kaj kabeado

Evidente ni ne konis la vorton “kabe”. El la iamaj kreatoroj de la nova lingvo, unu estis la plej inteligenta. Kaj kiam li lernis la vorton “nacio” li plendis, akre kritikis... “Tio devas esti “naciono”. Nu, li pravis... sed ni malĝojis, ĉar li forlasis nan grupeton.

Venis mia vico kabei... Estis poemo kiun mi ŝatis. Sed mi ne komprenis la titolon: Sceptro.

En kiu diabla lingvo estis tiu vortaĉo? Finfine mi malplezurege konstatis, ke tio estas en Esperanto... en la portugala multe pli simple “cetro” [sètro]. Ankaŭ mi emis ... kabei.

Finfine ni vivis en la Paradizo, ni estis feliĉaj.

Tiam mi kaj Geraldo studis en la sama seminario, kie ne plu estis divido de aĝo. Li sciis la lingvon multe pli bone ol mi. Kaj li verkis, tradukis kaj skribis al fama brazila esperantisto Ismael Gomes Braga. La respondo venis entuziasmega. Ne nur la respondo, venis libroj, pluraj libroj. Poste, ĉiumonate pliaj libroj. Kalkulu: La Faraono, Peer Gynt... mi estis knabo 15-jara kaj legis tion, jes. La korespondado kun Ismael longe daŭris. Li estis nia esperantista patro.

Kaj tiam Geraldo kaj mi adiaŭis la seminarion. Mi havis kroman motivon: mi estis herezulo, ne forgesu!

Iam mi vizitis mian amikon en Kuritibo (Curitiba). Tie estis bona klubo. “La plej fama estas kolonelo, kiu bonege parolas la lingvon!”... Nu, oni nin prezentis kaj

mi ekbabilis kun la famulo. Post duonhora konversacio li diris: "Vi ja parolas bone la lingvon, sed ankoraŭ faras kelkajn erarojn." (mi ankore subride aldonis: "Kaj vi faras multajn!") Do senprobleme mi parolis eĉ kun kolonelo, ne nur kun Geraldo.

Instruisto de lingvoj

Mi jam estis 25-jara kaj fariĝis gimnazia instruisto de lingvoj: portugala, latina, angla, franca. Tamen, mi ne havis fakultatan kurson, do oficiale mi ne rajtis instrui. Por solvi la problemon de manko de instruistoj em la internlandaj urboj, tiama registaro devigis la instruistojn sen fakultato lerni dum tuta feria monato, ok horojn ĉiutage, kaj fine de la monato ekzameniĝi. Se ne aprobite, la instruisto ne rajtis instrui kaj devis refari la kurson.

Mia scio pri la angla estis mizera. Sed mi konstatis, ke tiu de miaj kolegoj (ĉiuj pli aĝaj ol mi) estis des pli malbona. La instruisto estis severega, tamen bonkora kaj kompetenta (eĉ aŭtoro de vortaro). Mi bone lernis.

Venis la ekzamena tago. Unua ero: reskribu proze, tute libere kaj komentariu. Estis poemo. Mi legis la titolon: Dio mia, mi konas neniun vorton! Mi legis plue: ankaŭ tie mankis al mi scio pri pluraj vortoj. Mi tenis min por ne esplori. Subite mi vidis la nomon de la poeto: Longfellow. "Mi konas tiun ulon! Kie?" - "En la Krestomatio!" - anĝelo sufloris al mi... kaj mi

rediris parkere la versojn. Eble ne tute ĝuste, sed negrave. Mi ekverkis... longan tekston.

Kelkaj kolegoj fakte esploris... Mi kompatis ilin, ili ne lernis Esperanton!

Sekvatage, dum redono de la ekzamenajoj, kelkaj kolegoj kuraĝe protestis kontraŭ tro severa ekzamenaĵo, "imagu, reverki poezion!?"

La profesoro serene reagis: "Mi simple volis koni vian vortostokon. Jen ekzemplo de kolego via..." Kaj li komencis legi...

"Tio estas mia!"

Fine li transdonis ĝin al mi, kaj diris "Gratulojn!".

Por plibone fini mian tekston, jen la poemo de Longfellow en traduko de A. Grabowski:

LA SAGO KAJ LA KANTO

*Mi pafis sagon en la aeron,
Ne scias, kie ĝi falis teron;
La forfluganta tiel rapidis,
Ke mi la kuron tute ne vidis.
Mi spiris kanton en la aeron,
Ne scias, kie ĝi falis teron!
Eĉ la plej bona akrevidanto
Ne povas sekvi flugon de l' kanto.
Mi longe poste, unu tagon,
En kverko trovis la tutan sagon;
La tutan kanton kun la muziko
Mi trovis en la kor' de amiko.*

Mirinda renkonto (3/10)

(tria parto)

La vetero estis tre ŝanĝiĝanta. Se matene aperas grizaj nuboj posttagmeze pluvos eĉ okazos ŝtormeto. Poste aperas Suno kaj aero varmiĝas tiom multe ke iĝas pli kaj pli sufoka. Sed pro la ofta pluvo kreskiĝis herboj. Verdiĝis naturo kie ajn oni rigardis. Kaj kie estas verda herbejo ankaŭ troviĝas diversaj floretoj, tial arbaro aspektas mira. Gaja pepado aŭdiĝas ĉie, eĉ griloj ĉirpantaj tuttage feliĉigas ĉiujn orelojn.

Iun el tiaj tagoj la knabeto Petro decidis ekkoni sian amikinojn Jana kun liaj geamikoj el la Verda Arbaro. Li scias uzi telefonon – tion ja, panjeto lernigis lin – kaj fru matene senpacience li alvokis ŝin.

–Jana, mi decidis, ke ni kuniru Verdanan Arbaron por ke vi ekkonu miajn amikojn. Ĉu vi akceptas ke ni revidu nin proksime de la enirejo de nia mira arbaro? – diris li tute certa ke ŝi akceptos lian proponon.

–Jes, ni revidu nin ĉe la unua benko ĉe enirejo. Enorde? – respondis ŝi ride.

Petro kaj Jana sidis sur la unua benko ĉe la enirejo de la verda mira arbaro.

verkis kaj sendis Miriĉ Jadranka el Serbio

– Kia beleco – diris Petro. La herboj kreskis tre alte. Ĉu vi sentas kiel suno varmigas niajn kruojn? demandis Petro silentan knabinon.

– Jes, la suno baldaŭ ruĝigos la haŭton. Mi surmetis sunokulvitrojn. Panjo aĉetis ĝin por mi pasintsemajne. Ĉu ĝi plaĉas al vi? diris Jana transdonante la sunokulvitrojn al li.

– Vidu ili estas plastaj sed koloraj. – diris ŝi ŝerce.
– Ho, mi havis similajn. Sekvontfoje mi kunportos ĝin. Nun mi ne plu estas honta – fripone li okulsignis al ŝi.

Tiam li brue kriis:

– Jen, miaj amikoj!! Ĉiuj samtempe venas kun feliĉaj mienoj. Li montris al ŝi al la venonta gaja amikaro – bela bojanta hundo kaj duone blankmakulita kato akompanata de diverskoloraj flugantaj papilioj. – deklamis Petro prezentante ilin laŭ ilia aperado.

Jana tenere tuŝadis la katan dorson dum hundo sidiĝis lekante la manon de Petro

– Bonvenon al ni, karaj amikoj – gaje diris kaj Jana kaj Petro

– Venu ĉe ni belaj papilioj. Alflugu sur ŝian nigran



hararon. Estu vi kvazaŭ floretoj en ŝia hararo..... ne timu Jana, lasu ilin alflugi sur la harojn – Petro aplaudis mane brue salutante la papiliojn.

– Estas bela vidaĵo ĉi tie. Pejzaĝo baniĝanta en la brilo de la suno. Jen, feliĉaj papilioj flugantaj tien alien – diris senspire Jana.

Tiam Petro ekkriis :

– Ho, mi tute forgesis:

– Kie estas nia birdo? Ĝi ne aŭdiĝas... Li kuris maldekstren, poste dekstren kaj antŭen, turnis malantaŭen sed nenie vidiĝis la birdeto.

– Verŝajne io okazis al la birdeto... Venu kamaradoj miaj, ni serĉos ĝin en tiu ĉi direkto – li diris kaj fingre montris la mallarĝan vojon kiu serpentis ĝis la unuaj arboj.

Kiam ili proksimiĝis al la arbarrando ili rimarkis la birdeton staranta sur la hakita tiliobranĉo.

– Kial vi estas malgaja .Ni ne aŭdis vian gajan pepadon– demandis zorgeme Petro .

– Ho, tragedio, la granda tragedio okazis .Iu fripono ĵetis mian neston per ŝtonĵetilo. Nun mi devas denove kolekti branĉetojn por fari novan neston. Somero rapide pasas

–Veras, sed ne estu malgaja .Vidu ni faros volonte al vi novan neston.

Dirite farite!

Jana enplektigis la flekseblajn branĉetojn samkiel la panjo plektigas al ŝi longajn harligojn. Ĉiu helpis donante po unu branĉeto. Tiel nesto ja, estis rapide plektita. Nun ĝi staras sur la trunko de hakita tilio.

– Ekestis nova problemo – kiamaniere ni prenos la neston alten en la branĉaron de tiu alta betulo.

Subite la papilioj forflugis timigitaj de infanajn kriaĉoj. Iuj el la grupeto de infanoj kuris por kapti la papiliojn per papiliokaptilo. Tiam ekbojis la hundo postkurante ilin kiom eble pli malproksimigante ilin de la hakita tilio.

– Kion ni atendas–diris Jana Rapide ni decidu kion fari. Kiel ni savu la neston?

Tiam la duone blankomakulita kato eksaltis, per dentoj kaptis la neston kaj rapide surgrimpis sur betulopinton. La kato forlasis la neston inter la branĉetoj kaj ju pli ĝi surgrimpis la betulon ĝi malsuprenigis ĝin.

Nun la kato milde rigardis surprizitan mienojn de Jana kaj Petro, kiu unua etendis la manoj por brakumi ĝin.

– Bela saĝa kato! Dankon, por solvita problemo. Ni ambaŭ - fingre montrante al ĝi poste al li - dankas al vi. Nia birdo estas savita. Ĝia nesto estas metita alten kaj neniu povos damagi ĝin. Nu, nun ni kune gaje ekkantu „Vivu amikeco“.

La sonorilo troviĝanta sur la urba Preĝejo jam anoncis tagmezon. La infanoj ankoraŭ ĝoje ludadis malkovrante la belecon de la mira arbaro.

– Ni estas malsataj kiel lupoj. Ni devas adiaŭi vin. Ne forgesu morgaŭ ni revidos vin. Kaj ni preparos surprizon por vi – feliĉe aldonis Jana - Do, ĝis la revido !

– Ĝis la revido amikoj! – eĥas arbaren dum Petro kaj Jana estas survoje revenintaj hejmen.

(Fino de la tria parto)

Irenda sorto de la virino

-- Librorecenzo

La ĉefrolulino Eva edziniĝis al la najbara junulo Ivo, kiam ŝi estis ankoraŭ sufiĉe juna, sed post nelonga tempo ili disiĝis ĉar ili devis loĝi aparte kaj distance respektive.

Post la divorco, la apotekistino Eva renkontis Dragomir-on, direktoro de ĉokoladfabriko kaj ili enamiĝis unu al la alia. Malfeliĉe ilia miela vivo kiel geedzoj ne longe daŭris pro abrupta trafika akcidento de Dragomir.

Antaŭ la mornplena Eva poste aperas la viro Kiril, kiu en tiu momento laboras en ŝia urbo. Ili enamiĝas, sed iun tagon Kiril malaperas sen sciigo. Poste Eva informiĝas tra kolego lia ke li jam havas edzinon kaj infanon.

Kvankam la ĉarlatano Kiril forlasis ŝin, Eva tamen decidis naski lian bebon. Kun la amata filino Lili, ŝi baraktas en malfeliĉa vivo kontraŭ la obstakloj de la vivtenado, sed por realigi la sonĝon de Lili, kiu sopiras esti baletistino, Eva faras sian plejblon kiel

patrino.

Legante 'Tra la padoj de la vivo', mi estis ensorbita en la novelon pro ĝia orienta etoso, kvazaŭ mi legis korean novelon: intima familiara rilato inter familianoj, sensona sekvo laŭ la diraĵo de la patro, persista patrina amo al sia filino kaj ĉasta vivo de vidvino. En la novelo mi ne

sentis ajnan kulturalan diferencon inter oriento kaj okcidento, kio konformas al la universaleco de Esperanto-literaturaĵo. Krome estas mirinde ke Julian

Tra la padoj
de la vivo



Julian Modest

delikate priskribas la animstato de la virino.

Same kiel la aliaj ĝisnunaj noveloj de Julian Modest, 'Tra la padoj de la vivo' estas facile legebla verko por tiuj, kiuj estas enirantaj en la mezan Esperanto-nivelon. La stilo de Julian Modest estas

simpla, sed lia esprimmaniero estas elstara. Mi certas, ke vi finlegos la novelon ene de unu horo senspire.

-- recenzis **LEE Jungkee**

Krucvortenigmo




HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Dungi, lupreni; 3. Longa aŭ ripetita paso; 10. Mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj; 11. Arbo de koto; 13. Prepozicio signifanta akompanon; 15. ___ de Enigmoj; 16. Denove; 17. Semajno de ___; 18. Ĉiu organo lokita en la kranio, brusto aŭ ventro; 20. La litero K; 22. Vernacion; 23. Rilata al la biologia likvaĵo en la buŝo; 24. Unuo de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj; 25. La litero T; 26. Planto por fari farunon; 27. Azian bordon de la Egea Maro.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Perlabori; 2. ___, due, trie; 3. Pronomo aŭ adjektivo, esprimanta apartenecon; 4. Prezenta atento; 5. Partoj de la garnaĵo de lito; 6. Vorto eltirita el alia vorto per alivico de la literoj; 7. Malsuperan dion kiu malbone influas la sorton de homo; 8. Frakseno; 9. La litero B; 12. Kompromito de la funkciado aŭ negocojn de kontraŭulo; 14. Sen volo;



19. Nin, vin, ___; 21. Frakcion kun numeratoro egala al unu; 22. Fare de; 23. Landokodo de Singapuro.

Fonto: Semajno de Enigmoj #6

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

5>>

planedoj, labirintoj, mensludoj, materiaj kaj post materiaj spacoj. Fiziko, ĥemio, bioĥemio, genetiko, astronomio, filozofio, aventuro kaj fikcio.

KINO ESTAS GEOLOGIO ARĤEOLOGIO, ANTROPOLOGIO, PALEONTOLOGIO

Norda Nanook, La Perdita Mondo, La Talpa Popolo, Rabatakantoj de La Perdita Kesto, Indiana Jones, Fajro Milito, Infero de simioj, Aguirre- Dia Kolerego, Tie, kie la Verdaj Formikoj Revas, Eksterordinaraj Aventuroj de Adèle Blanc, Reĝino de Dezerto, Tertremo, Lavango, Vulkano, Vojaĝo al la Centro de la Tero...

Ni pasigas tempon en kino, foje rigardante katastrofon, foje kun timo kaj streĉo, foje ridante, foje lernante sciencajn esprimojn, foje atestante la vivon de diversaj kulturoj tra la mondo. Ni ne malŝparas tempon. Ni riĉiĝas per tiaj filmoj.

Dum dokumentaj filmoj enkondukas nin al la faktoj, filmoj, en kiuj fikcio kaj scienco interplektiĝas, kolorigas nian imagon, mirigas nin kaj provokas nin iri preter la materia mondo, en kiu ni vivas.

Kino ne estas akademio, filmo ne estas universitata lernolibro, videaĵo aŭ katedro de

profesoro. Sed ĝi instruas, direktas kaj scivoligas homojn. Ni povas trovi multajn sciencistojn, kiuj komencis sian sciencajn karieron pro scivolemo, kiun vekis iam ia filmo... Jes, certe!

Einstein iam diris: "Ĉio komenciĝas per infana scivolemo. Kiam mi estis etulo, mi rigardis la ĉielon kaj imagis min rajdi sur stelon kaj vojaĝi pere de ĝi."

KAJ KINO ESTAS AMO

La amo inter viro kaj virino, multaj bildoj sigelitaj sur la kvadratoj de la filmbobeno, kvadratoj pri amorado kaj kisado, la amo de pasiaj vivoj de geniuloj por scii, krei kaj malkovri en filmoj, la rakontado de amoj, kiuj vivigas la homon, la rakontado de amo, kiu detruas kaj perversigas homojn...

Kaj la AMO POR KINO de la tuta personaro, kiu faris ĉiujn, ĉi tiujn filmojn kaj prezentis ilin al ni!

Konuralp Sunal

22-a decembro 2020

Buyukada insulo, İstanbulo, Turkio



Parto 3

Pri la ĉefpuno kelkaj eĉ
ne havas rudimenton
Kiam ĉesigos ĉion-ĉi
kiam faros Vi penton?

Kelkaj el Vi senhoneste
Diecon pretendis
Por konkeri tutan Teron
la svingon etendis.

El diraĵoj de miloj mi
jen, kion al Vi citas:
"Ne pensante la sekvon Vi
Militas kaj militas!".

Pro militoj elpensitaj
kaj maldecaj memvoloj
Malaperis sur la Tero
multaj landoj, popoloj

En Via longhistorio
la militoj plen-plenas
Ne forgesu ke en finon
Vi rapide alvenas.

La militojn senfinajn mi
ne kapablas kalkuli
Ĝis kiam Vi daŭrigos
je la pekoj sin ruli!

Nenio Vin perfortigas
memvole Vi sin ĝenas
Singardu Vi ke potempe
Ĉefjuĝejon alvenas!

Parto 4

Nur kelkaj vivas bombaste
Milionoj malsatas
Pro la tiaj maljustoj Vin
senĉesaj plagoj gvatas!

Forgesinte la Sekvon, Vi
ĝis kiam ĝojos, festos?
Meditu, la heredaĵo
al kiu ido restos?

Okazigi ĉian volon
Dio Vin malpermesas.
Sed Vi faras kion volas
Kiam ĉi-ĉio ĉesas!

Ho, HOMARO! Ĝis kiam Vi
daŭrigas ĉi-ĉion?
Vi forgesis sian Devon
Vi forgesis la Dion!!!

Kelkaj Viaj "geniuloj"
Okazinte malmoron
Volis ke la samgentanoj
Ne konu GrandSinjoron!

Ĉefa tasko de "fiuloj",
ilia ĉefa volo
Estis ke ĈefKreinton
forgesu la popolo...

Kie estas tiuj fiaj
malamikoj de l' Homar'?
Por ilia ekzistado
la Dio mem faris bar'.

Kie estas tiuj, ĉiuj
perfortul' - potenculoj
Kies putriĝintaj korpoj
kuŝas en
diversanguloj.

Kie estas ili mem kaj
kie iliaj temploj?
Tiaj maliccelaj uloj
por Vi estas ekzemploj!

Ĉiuj kiel guto en step'
malaperis, forpasis.
Kion donis al vi ili,
kaj kion ili lasis?!

Ĉesis iliaj estaĵoj
mankas jam ili, mortis
Estinte "fosto de l' Mond' "
kion ili kunportis?!

Kiu caro alilandojn
kun perforto aneksas
Ties landon la Dio mem
spite al dissekcas.

Kiu avare ekvolas
la tutmondan konkeron
Tiu sekve bezonegas
eĉ tute etan teron!

(daŭrigota)

32>> esperantistoj el la mondo? Ĉu la katedralon? Eble ne, ĝi estis fermita. Ĉu la tuttagan ekskurson? Eble. Ni estis en Feropolis (koncertejo en eksa karbejo) kaj en vinkelo ie proksime de Freyburg/Unstrut. Eble ili memoros, ke la estraro de la junulargastejo estis tre agrablaj gastigantoj. Sed certe ili plej memoros, kiujn novajn amikojn ili ekkonis. Tiel estas ĉiam en IS.

Por 2004/05 jam klaras, ke IS okazos de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro en Wetzlar. Aktualaj informoj estos en <http://www.esperanto.de/is/>.

ĜIS!

Fonto: **Legolibreto 2** de Jindřiška Drahotova



*Solvo de la
krucvortenigmo*

N	O	I	N	O	Ĵ		O	N	E	R	G
O	L		O	M	O		V	I	T	V	S
N	O	G	N	V	R	V	I	T	O	F	
O	K		O	R	E	C	S	I	V		I
	Ĵ	O	M	I	G	N	E		E	R	E
		O	N	Ĵ	V	M	S		N	K	
O	B		A	R	N	O	T	O	K		N
B		O	D	A	S	V	P		I	L	

Palisaro

Iam mi ricevis de Italujo retmesaĝon de tute nekonata sendinto. Ĝi estis sufiĉe longa kaj mi ne tuj legis ĝin. Nur kiam mi ordigis korespondaĵojn, mi legis ĝin kun intereso. Ĝi impresis min, sed ĝi magie denove perdiĝis kaj mi ne plu trovis ĝin. Tamen mi povas ĝin rakonti al vi parkere. Do, atentu...

En iu vilaĝo loĝis knabo de honestaj gepatroj, kiu havis kolereman, eĉ agreseman karakteron. Iun tagon vokis lin lia patro kaj donis al li grandan sakon da najloj kaj martelon. Poste ili iris al palisaro kaj la patro diris: „Vidu la kolonon. Ĝi estas ligna. Ĉiam, kiam vi ekkoleros, iru al ĝi kaj enigu en ĝin la najlon. Diru al mi, kiam la provizo da najloj finiĝos.“

La knabo estis obeema kaj respektis la patron. La unuan tagon li enbatis sep najlojn kun granda emo. La tempo fluis kaj najloj malpli kaj malpli rapide perdiĝis de la sako, ĝis venis la tago, la sako estis malplena.

La knabo iris al la patro kaj diris: „Patro, ĉiuj najloj estas enbatitaj. Mi ne ŝatas plu enbati ilin, pli facile estas por mi ne koleri.“

La patro diris al la knabo: „Iru kun mi al la kolono, mi estas feliĉa, ke vi opinias koleremon superflua. Tamen, ĉiu malbona ago bezonas bonan agon, ke estu ekvilibro. Se vi faros bonagon, rekompencu vin kaj eligu unu najlon el la kolono.“

La knabo penseme rigardis la patron kun miro. Nur post tago li iris eligi unuan najlon de la palisaro. Longan tempon, pli longan tempon daŭris la eligado de la najloj, ol la enbatado. Sed venis tago, kiam ĉiuj najloj estis for de la kolono kaj la knabo denove iris al la patro kaj diris: „Patro, la najloj ne estas plu en la palisaro.“

La patro serioze ekrigardis la filon kaj invitis lin iri denove al la kolono. Ĉi tie la patro montris al la kolono kaj diris: „Mia filo, mi vidas, ke vi plenumis mian peton kaj ĉiun koleragon vi kompencis per bonago, sed vidu, la cikatroj restis kaj plu restos en la kolono. Tio same okazas en homa animo – se homo malbonon kompencas per bono, cikatroj neniel malaperos.“

La knabo klinis la kapon kaj la patro prenis lian kapon en siajn manojn kaj rigardis en liajn okulojn.

Raporto pri Internacia Seminario en

Naumburg -- el Verda Saksofono, 2/2004, Erik Sinde (Dresden)



De la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro okazis kiel ĉiujare ankaŭ ĉivintre la Internacia Seminario (aŭ Semajno, laŭplaĉe) (IS), kiu estas samtempe kiel seminario (ĉi-jare: „Naturmedio – strukturo, ekspluato, protekto“) la plej bona silvestra festo por multaj gejunuloj el multaj landoj. Partoprenis 250 homoj el 26 landoj, kaj la bebo (Fenna el Nederlando ĉeestis jam la lastan jaron, tiam ankoraŭ ene de sia patrino) ĝis pensiulo inter IS-anoj (la fama sinjoro Stroinski el Leipzig), ĉeestis ankaŭ ontaj kaj eksaj (aŭ eternaj) gejunuloj. Kion mi skribas? Mi mem jam alproksimiĝas al 40! El Saksio ni estis 12, kaj la belaj knabinoj el Saksio ne nur kreskas sur la arboj, sed ankaŭ bone dancas, kaj du el ili (kun siaj partneroj) gajnis la unuan kaj trian premiojn en la danckonkurso okaze de la silvestra balo. Cetere, el Saksio estis ankaŭ la nuna prezidanto de GEJ (Germana Esperanto-Junularo): Felix Zesch.

La oficiala vesperprogramo enhavis interalie teatran vesperon („Stilaj Ekzercoj“ de Raymond Queneau), jam tradicie „La Kuracistojn“ (la muziko de „Die Ärzte“ esperantigita). La diskoteko kaj la trankvila teejo „Gufujo“ funkciis ĝis malfrunokte, kaj ankaŭ filmoj kun Esperanto-subtitoloj (inter ili „Good-bye Lenin!“) estis dumnokte montrataj, tiel ke la plej trankvilaj horoj en la junulargastejo kaj en la amasloĝejo estis la matenaj horoj – ankaŭ tio jam estas tradicio. La amasloĝejo ĉi-jare plene meritis sian nomon. Proksimume la duono de la partoprenantaro „loĝis“ sur kunportitaj matracoj, unu tuj apud la alia, en sufiĉe malgranda konstruaĵo sur la tereno de la junulargastejo.

Ekster la oficiala programo ni ludis (normalan kaj ĉinan sakon, kartludojn k.a.) kaj ankaŭ pritraktis sensencajn filozofaĵojn. Ĉu vi volas ekzemplon? Bone. Difino de „nacia nivelo“: Se vi iam ajn manprenis kun la prezidento de via lando, vi havas la nacian nivelon unu. Se vi manprenis kun iu, kiu havas la nacian nivelon unu, vi havas nacian nivelon du. Kaj tiel plu ĝis infinito. Preskaŭ ĉiuj el ni havis la nivelon tri, ĉar la onklino de ĉeestantino havas Johannes Rau en sia amikaro.

Kion pri Naumburg memoros post kelkaj jaroj la

>>>31

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

 RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO
 Eldonanto : Turka esperantistaro
 Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds